

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

4
1997

ISSN 0052 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

Esperanto


KUL

V-18034/1997

Perspektivo de la petrolo industrio en Ĉinio

**En Loĝkvartalo
de Tianjin**

**Intervjuo kun ĝenerala
direktoro de UEA**



Helikoj

Foto de Yi Ming

INTER NI

La Fondaĵo EPĈ-abono establita en 1993 celas helpi e-istojn, kiuj havas financan malfacilon aboni nian revuon. Estis multo memorinda en la pasintaj tri jaroj: Dank' al 106 donacoj (vidu la listojn en nia revuo), 1 500 samideanoj ricevis EPĈ. La donacintoj ne nur monhelpis, sed ankaŭ prezentis bonajn opiniojn pri la Fondaĵo.

Nia brazila leganto R. Marulo diris: "Estis agrabla surprizo ekscii la ekziston de 'Fondaĵo EPĈ-abono'."

Dum la 81-a UK en Prago s-ino Mandita Iacob el Nederlando donacis monon al la Fondaĵo pere de nia delegacio, poste ŝi inspiris nin per afabla letero.

La legantoj, kiuj ricevis la donacitan revuon, sendis dankleterojn al ni.

Jen vortoj el letero de H. Manolov el Bulgario: "Jam kelkajn jarojn mi ricevas vian gazeton dank' al la subteno de alilandaj sami-

deanoj, kiujn vi instigas helpi finance la abonigon. Tutkore mi dankas vin kaj ilin, ĉar alimaniere mi, preskaŭ malriĉa instruistopensiulo, ne povus havi la plezuron sekvi la interesajn materialojn de EPĈ kaj diskonigi ilin ĉe miaj geamikoj."

En sia letero slovaka samideano Ernesto Vana dankis la donacintojn kaj diris: "EPĈ estas admirata en nia E-klubo. Ni tre bedaŭras nur, ke pro la grandaj ŝanĝigoj, kiuj okazis en nia nova lando, nemultaj povas aboni la gazeton." Li ankaŭ menciis la altiĝon de afranko en sia lando, por ke ni komprenu la malfacilaĵon.


Tamen la Fondaĵo havas limigitan forton, kaj multaj samideanoj povas nur legi nian revuon ĉe siaj amikoj.

Ni kore dankas ĉiujn donacintojn kaj esperas, ke subtenate de niaj legantoj, la Fondaĵo EPĈ-abono ebligos al pli multaj samideanoj legi nian revuon.

La Red.

El Popola Ĉinio

4 [463] 1997



Taklimakan
Foto de Ma Xingyuan

Taklimakan, la plej granda dezerto de Ĉinio, estas abunda je nafto kaj natura gaso kaj konata kiel nova petrol-bazo de Ĉinio.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"


Direktoro: Hou Zhiping

Adreso: P.O.Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

ENHAŬO

- 2 **INTER NI**
4 En loĝkvartalo de Tianĵin
6 Fervoraj volontuloj
8 Bela juna bovisto
10 **ESP-NOVAĴOJ**
11 **ĈINAJ E-ISTOJ:**
Ŝadman kaj Ĝazira
14 **ORIGINALE**
VERKITAJ:
El nebulo de miaj rememoroj; La neatendita
16 **POR KOMENCANTOJ:**
Lerni parolon
17 En antikvaĵaj bazaroj de Pekino
20 **TEMO PROPONITA DE**
LEGANTOJ:
Kursoj de ĉinaj mezlernejoj
22 En urbeto de anasoj
24 Rakontoj pri la Ĉina Virina Piedpilka Teamo
25 **HOMARO KAJ**
NATURO:
Oazo en dezerto
28 **LAŬ LA SILKA VOJO:**
Jiayuguan-pasejo — la fino de la Granda Muro
35 Mia unua impresoj pri Hongkong
37 **EKONOMIE:**
Perspektivo de la petrola industrio en Ĉinio; Ekologia agrikulturo sur alkalaj kampoj; Kurantaj aferoj
40 **JUNULARO:**
Amantoj de ĵipo
42 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
44 **MULTNACIA ĈINIO:**
Kulto al la bambuo
46 Sunsubiro ĉe bovlobakujo (Novelo)
48 Brito en suda Ĉinio
51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**
Raraj animaloj
2 Helikoj
SUR LA
DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE
Ē-ISTOJ]
Vintro en Alaska; En Rottneros-parko, Svedio



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

1. Tianĵin (p. 4) 2. Urumĝi (p. 11)
3. Yucheng-gubernio (p. 38) 4. Guilin (p. 48)
5. Tibeto (p. 40)

En loĝkvartalo

SEPTEMBRE de 1996 pre-
paris transloĝigon loĝantoj
de la loĝkvartalo Yiqingli
(Jiĉingli), Tianjin (Tjan-
ĝin), ĉar la loĝkvartalo estos rekon-
struata. Iuj maljunuloj longtempe
premis la manojn de la estro de la
loĝkvartala komitato kaj kun be-
daŭro forlasis la lokon, kie ili loĝ-
is multjare. Post nelonge tiu estro
kune kun la estraranoj de la an-
taŭa loĝkvartala komitato iris al la
setlejo por viziti la loĝantojn. Je la
revidiĝo, ili varme babilis kvazaŭ
familianoj antaŭ longe disiĝintaj
unu de alia.

Tio estis ordinara kvartalo de
Heping-distrikto, kiu havas 256
loĝkvartalojn similajn al Yiqingli.
La loĝantoj kune vivis en paca kaj
harmonia atmosfero, helpante unu
alian.

Heping-distrikto troviĝas en la
centro de Tianjin. Tie staras kaj
modernaj komercaj domegoj kaj
malnovaj domaĉoj. La distrikto
kun areo de 10 kvadrataj kilome-
troj havas 500 000 loĝantojn kaj
milionon da migrantoj.

POR ŜTATOFICISTOJ NE ESTAS BAGATELOJ EN LA VIVO DE LOĜANTOJ

Komence de 1996 Heping-
distrikto okazigis sian 9-an renkon-
tiĝon por premii "10 bonajn publi-
kajn servantojn". Sur la podio re-
prezentantoj de la loĝantoj alkroĉis
al ili ruĝajn florojn. La senprofita
rekompenco proponita de la loĝan-
toj por glorigi elstarajn ŝtatoficis-
tojn originis el jena historio:

Fine de 1988 pro merkata ŝan-
ĝiĝo streĉiĝis la livero de karbo kaj
brasikoj. Por ke la loĝantoj de
la tuta distrikto vintru en var-
maj ĉambroj, la distrikta registaro

faris ĉion eblan por kontentigi la
bezonojn de la loĝantoj. Dume pli
ol 500 ŝtatoficistoj helpis komerce-
jojn en vendado de brasikoj tage
kaj en transportado de karbo ves-
pere. La kortuŝitaj loĝantoj pro-
ponis rekompenci ilin per honor-
ado.

Fakte, en 1983 la distrikta re-
gistaro jam prenis servadon al la
loĝantoj kiel sian gravan laboron.

70-jara Shi Huimin, estro de la
loĝkvartala komitato, fondis kel-
kajn terciarajn industriajn entre-
prenojn sub malfacilaj kondiĉoj.
Dank' al tio, oni ne nur reenoficig-
is pli ol 30 personojn, kiuj perdis
laboron, sed ankaŭ monhelpis
la malriĉajn familiojn, organizis
ekskurson por maljunuloj kaj fon-
dis amuzan stacion en la loĝkvar-
talo.

Dum 9 jaroj pli ol 700 ŝtatofi-
cistoj estis premiitaj. Kvankam ili

faras malsamajn laborojn, tamen
ili havas komunan trajton, t.e. por
ili ne estas bagateloj en la vivo de
la loĝantoj.

LOĜANTOJ-VOLONTULOJ

En alia loĝkvartalo maljunuli-
no montris al ni malgrandan ligan-
nan tabulon pendantan sur pordo
de etaĝdomo. Sur ĝi legiĝas speci-
aloj de la tieaj loĝantoj, ekz., bar-
birado, kuracado, riparo de bicik-
loj kaj elektraĵaj aparatoj. Ŝi diris al
ni: "Ĉe ni estas multaj aferoj, kiuj
bezonas reciprokan helpon de la
najbaroj. Mi ne lertas en teknika
laboro, sed mi havas multe da tem-
po, mi povas prizorgi infanojn kaj
gardi la najbarajn domojn."

Nun plejparto da loĝdomoj kaj
kortoj de Heping-distrikto prak-
tikas la menciitan servadon. Tiu
maljunulino estas unu el la miloj
da volontuloj.



Ĉe amuzejo de maljunuloj

de Tianjin

Komence de 1988, influate de la nobla spirito de ŝtatoficistoj, 13 familioj de Chaoyangli-loĝkvartalo volonte prenis sur sin la laboron flegi 13 mizerajn maljunulojn.

Marte de 1989 stariĝis loĝkvartala Volontula Servo-Asocio, la unua en Ĉinio. Tio inspiris multajn loĝantojn de la distrikto. Ne longe poste, 256 loĝkvartaloj de la tuta distrikto fondis ĉiu sian volontulan asocion kaj filion.

Komence, la volontuloj helpis najbarojn solvi malfacilojn. Poste iom post iom la servado kovris ankaŭ aliajn kampojn kaj favoris pli multajn loĝantojn.

En la distrikto cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri tiuj volontuloj. Inĝeniero Liu Jiayi (Liŭ Ĝjaji) riparas por aliaj pli ol mil elektrajn aparatojn en postlaboraj horoj dum kelkaj jaroj. Kuracisto Xu Shengyao prizorgis 11 maljunajn

gevidvojn kaj faris funebrajn aferojn por 4 el ili. La Kvartala Administrejo de Xing'anlu starigis amuzan centron, por ke maljunuloj babilu tie kaj ne plu sentu sin solecaj. Iuj el ili eĉ enamiĝis unu al alia kaj geedziĝis. La 10 virinoj de la mikrodiktafona sekcio de la Binjiang(Bingĵang)-a Komerca Domego sin organizis por helpi proksimajn loĝantojn en postlaboraj horoj.

Inspirate de ilia sindonemo pli kaj pli multiĝas loĝantoj-volontuloj. Tiajn servajn aktivadojn partoprenis ankaŭ alilokaj profesoroj, studentoj kaj eĉ alilandanoj. Ekz., studentoj de la Biologia Fakultato de la Tianjin-a Normala Universitato volonte flegis maljunajn seninfanajn geedzojn dum pluraj jaroj. Kiam ili diplomigis el la universitato, aliaj studentoj de la fakultato daŭrigis ilian bonfaron.

Hodiaŭ en la distrikto viglas pli ol 50 000 volontuloj kaj 388 membroj-kolektivoj. La servado fariĝis socia moro de la distrikto kaj la loĝantoj vivas pli kaj pli harmonie kaj intime.

KUNLABORADO

La loĝantoj de la distrikto ne nur vivas en harmonia atmosfero, sed ankaŭ ĝuas bonajn kulturen kaj edukajn mediojn. Oni ŝuldas tion al la komuna penado de volontuloj, loĝantoj kaj diversaj departementoj de la registaro.

Loĝantoj certe aprobas kaj partoprenas la aktivadon, kiu kontentigas ilian bezonon. Alte taksante la aktivecon de la loĝantoj, la distrikta registaro gvidis ilin en la eduka, kultura kaj mediprotekta laboroj.

Heping-distrikto la unua fondis edukajn centrojn de la distrikto kaj loĝkvartaloj kaj funkciigas diversajn lernejojn por gepatroj kaj maljunuloj, kurson por trejnado, semajnfinan amuzejon por infanoj. Kulturaj aktivadoj estas enhavoriĉaj dum la tuta jaro, multnombraj konkursoj multe vigligas la aktivadojn kaj samtempe naskiĝis diversaj amatoraj artaj grupoj en la distrikto.

La loĝantoj ordigis kaj plibeligis sian loĝkvartalon. Ili ne nur faris sian propran hejmon pura, bonorda kaj bela, sed ankaŭ purigis la publikajn lokojn de la loĝkvartalo. Nun pli ol 60 000 familioj de la distrikto havas interhelpan rilaton inter najbaroj. Loĝdomaj respondeculoj, 3 000 volontuloj kaj loĝantoj sin organizis por helpi la policanojn en konservo de la publika sekureco.

La loĝantoj de la distrikto profunde impresis nin per sia socialisma etika kaj kultura progreso. ■



Seninfana maljunulo helpata

WANG HANPING:

FERVORAJ VOLONTULOJ

VOLONTULOJ estas homoj noblaj, kiuj faras aferojn laŭdindajn tute laŭ sia propra volo kaj kun plezuro. Nun en la vasta Ĉinio ĉie sentblas iliaj helpemaj manoj.

Antaŭ nelonge dum mia restado en Heping-distrikto de la urbo Tianjin mi persone vidis kaj aŭdis multe da bagatelaj, tamen kortu-

ŝaj aferoj de volontuloj, kiuj kreis la harmonian vivmedion.

EDIFE DE MALJUNULO

En 1988 emeritiĝis s-ro Jin Yangshan, direktoro de butikoj de flankmangaĵoj.

En la domo, kie Jin loĝas, estas 17 familioj. Tie ne estas gasdukto, sed amasiĝis en la koridoro

ĉelar-formaj karbpecoj kaj aliaj objektoj, kiuj ne nur malpurigis kaj malbeligis la koridoron, ĝenis iradon, sed ankaŭ facile brulis. Pro tio, najbaroj ofte malpacigiĝis. S-ro Jin decidis ŝanĝi la medion. Ĉiu-matene li ellitiĝis frue, purigis ŝtuparon kaj koridoron de la unua etaĝo ĝis la kvina. Li faris tion tago post tago, monato post monato. Lia bonkonduco fine kortuŝis la najbarojn. Ili diris: "La domo apartenas al ni ĉiuj. Ni ne devas lasi onklon Jin tion fari sola." Ili do kune purigis kaj bonordigis la koridoron kaj kalkis la murojn.

La koridoro fariĝis pura kaj bonorda. Jin ekvolis ĝin beligi. Jin kaj lia edzino aĉetis paperon kaj farbojn, petis najbarojn fari murgazeton kaj pentraĵojn. La koridoro aspektas tute nova. La najbaroj ekvivis harmonie. Ili helpas unu alian en la ĉiutaga vivo. La domo famiĝis tra la tuta urbo pro sia unueco kaj reciproka helpado.

Influite de ili, la proksimaj domoj ekagis kaj la tuta kvartalo fariĝis pura kaj bonorda.

En 1990 Jin fondis legoĉambbron por geknaboj en sia propra hejmo. Li mem abonis ĵurnalojn kaj gazetojn. En festoj li organizis la geknabojn viziti parkon kaj domon de sciencoj kaj tekniko. Li organizis someran servan grupon por servi sur strato en la someraj ferioj.

Jin estas vicdirektoro de Maljunula Asocio de la kvartalo. Por gajigi la vivon de maljunuloj, li iniciatis operan trupon de maljunuloj kaj okazigas koncerton unu fojon ĉiusemajne por ilin amuzi.

Jin zorgas pri alies maltrankvilo kaj malfacilo kiel pri la siaj.

DUMVIVA MEDICINA LABORANTO

Wu Jiong sin ekokupis pri medicina laboro, kiam ŝi estis malpli-ol-20-jara. En la laboro savi gravajn malsanulojn kaj flegi



Jin en rakontado de historio



Doktorino Wu Jiong (dekstre)

vunditojn ŝi faris meritojn kaj estis premiita. En fama ĉina filmo "Heroaj Gefiloj" estas kuraĝa sanitaristino, kiu surekranigis surbaze de la historio de Wu Jiong. Sed Wu ne estas elmontriĝema. En 1959 ŝi eklaboris en iu ambulatorio kaj tie energie laboris 30 jarojn, sed inter ŝiaj kolegoj kaj najbaroj neniu sciis ŝian gloran historion.

En 1988 Wu emeritiĝis. Ĝuste tiam en ŝia loĝ-kvartalo oni organizis asocion de volontuloj. Ŝi, inspirata de tio, volis servi al la najbaroj per siaj scioj. Ŝi aĉetis kelke da kuracaj instrumentoj kaj ordinarnajn medikamentojn. Jen ŝi komencis kuraci kaj fari konsultiĝon.

Iu junulo de ŝia najbara domo suferis de psoriazo. Kaj krome, li plenas de ruĝaj makuloj suferis de ulcero en multaj korpopartoj. La kuracado en hospitalo ne estis efika. Li turmentigis de ĉagreno. Doktorino Wu kuracis lin du monatojn kaj la junulo resaniĝis

komplete. Avino Wang, suferanta de bronkito longtempe, loĝis fore de hospitalo. Wu do injektis al ŝi en ŝia hejmo dufoje ĉiutage.

Doktorino Wu sciis, ke la sanstato de maljunuloj estas prizorgenda. Por koni la adreson kaj sanstato de ĉiuj pli-ol-60-jaraj maljunuloj en la loĝkvartalo, ŝi vizitis ilin ĉiujn kaj faris sankarotojn por la pli ol 100 maljunuloj, kiuj suferas de kronikaj malsanoj.

En la pasintaj 8 jaroj doktorino Wu ekzamenis milojn da homoj en ilia hejmo, kuracis 1 700 homojn. Ŝi ĉiam estas sub dispono de la malsanuloj kaj laboras senpage.

Kiel doktoro, ŝi bone scias la gravecon de malsano-prevento. Pro tio ŝi faras propagandon kaj konsultiĝon pri preventado por pli ol 500 familioj en la kvartalo. Krom tio ŝi faris propagandajn materialojn kaj algluis ilin sur pordoj de ĉiuj domoj de la kvartalo.

Wu diris, ke se nur najbaroj

vivas feliĉe kaj pace, ŝi ĉiam volontas tion fari.

SPECIALA KONCERTO

Kantistino Chen Rongrong estas vicprofesoro de la Tianjin-Konservatorio. Ŝi diligente laboris pli ol 30 jarojn kaj faris grandajn sukcesojn en instruado kaj kantado.

En la lernejo ŝi estas bona instruistino, en la hejmo bona patriino, bona edzino kaj bona bofilino. En la socio ŝi estas fervora aktivulo pri publikaj aferoj.

Antaŭ 13 jaroj ŝi konatiĝis kun maljunulo Dai Qiji, kiu suferis de serioza tetano. Ŝi multe helpis kaj prizorgis lin. Ŝi kaj ŝiaj lernantoj ofte babilis kun la maljunulo por lin distri. Ŝi donacis al li sian propran kanto-kaseton. En festo ŝi donacis al li manĝaĵojn. Ŝi diris, ke ŝi esperas, ke la handikapuloj, kia li, vivos kiel sanaj homoj. Kuraĝigate kaj helpate de ŝi, la maljunulo rehavigis al si memfidon pri la vivo.

Ŝi abonis tri ĵurnalojn por la maljunulo. En la printempa festo de la lasta jaro ŝi, ŝia edzo, direktoro de la Tianjin-Konservatorio, kaj ilia filino faris specialan koncerton por la maljunulo, kiu neniam eldomiĝis en la pasintaj jardekoj. Informiĝinte, ke la maljunulo tre ŝatas la olepentraĵon de rusa pentristo Rebin "Haŭlistoj, Irantaj Vade", ŝi do prunteprenis la pentraĵon de la Belarta Instituto kaj metis ĝin en la ĉambro kiel fonon. Ili ĉiuj kantis po 4 kantojn. Aŭdinte la kanton "Oj, Hej", la maljunulo kun larmoj diris: "Vi prenas min kiel vian propran familianon..."

Chen Rongrong loĝas en Heping-distrikto, tial ŝi aktivas tie. Ŝi monhelpas vilaĝajn infanojn, kiuj ĉesigis lernadon pro malriĉeco, helpas malriĉajn familiojn, okazigas koncerton por handikapuloj...

Ŝi diris, ke respondeco de homo en la laboro estas limigita, sed tiu en la socio estas senlima. ■



S-ro Osmo Buller en la 81-a UK en Prago

YU TAO*:

BELA JUNA BOVISTO

— Intervjuo kun s-ro Osmo Buller

Estas bone konate de mi ke vi fariĝis direktoro de la CO de UEA en februaro de 1986, ĝenerala sekretario de UEA en 1989, ree direktoriĝis en 1991, kaj funkcias kiel ĝenerala direktoro de UEA en 1996. Do interesas min via esperantistiĝo, ĉu ĝi okazis antaŭ 30 jaroj?

— Mi eksciis pri Esperanto el diversaj libroj kaj gazetoj, sed mi decidis lerni la lingvon dank' al la Esperanto-elsendoj de Pola Radio. Alilandaj radioelsendoj fascinis min, sed ĉar mi ne scipovis fremdajn lingvojn, mi povis aŭskulti nur al tiuj radiostacioj, kiuj disaŭdigis en la finna. Unu el ili estis Pola Radio, kies Esperanto-elsendoj donis al mi la ideon lerni tiun lingvon por povi poste aŭskulti al pli da stacioj. Mi serioze eklernis la lingvon en januaro 1966.

Ĉu vi volonte rakontas motivon labori en la CO de 1985, kaj kiel vi esperantumis antaŭ ol labori en la CO?


— Mi membriĝis en UEA en 1968 kaj baldaŭ fariĝis junulara delegito kaj poste fakdelegito. Mia unua UK estis tiu en Helsinko en 1969. Ĝi estis vere grandioza sperto — en ĉiu UK mi envias tiujn, por kiuj ĝi estas la unua — kaj ĝi definitive katenis min

al nia movado. Mi konkursis pri laborposteno en la CO, ĉar mi de longe volis pasigi iom da tempo laborante eksterlande, kvankam ne nepre en Esperanta medio. En 1985 eblis realigi tiun revon ĝuste ĉe UEA, kio min ege ĝojigis. Estas ja granda privilegio, ke hobbio fariĝas profesio.

Post 1987 vi estis en Finnlando kaj revenis al Roterdamo en 1991, kion vi faris dum tiuj jaroj en via patrolando?

— Unue mi faris historian studon laŭ mendo de mia politika partio, sed pli longan tempon mi laboris en Taivalkoski kiel municipa sekretario pri kulturaj aferoj. Tiu loko situas en Norda Finnlando kaj tie mi naskiĝis. Cetere, dum tiu tempo mi kunlaboris kun la fama pola televida ĵurnalisto Roman Dobrzynski en la pretigado de la filmo "Reveno al Finnlando". Ĝi temas pri la spertoj de pola junulo kiel sklavo de la nazia germana armeo ĝuste en la regiono de Taivalkoski. Pola Televido elsendis ĝin plurfoje kaj ĝi estis sukcese montrita en multaj UK-oj k.a. renkontiĝoj.

En intervjuo de Mark Fettes en 1991 vi diris: "Mi sentis ke mia tempo por Esperanto ne sufiĉas, ĉar iel ĝi fariĝis unu el la ĉefaj aferoj en mia vivo. Mi sentas



S-ro Osmo Buller (maldekstre) kaj la aŭtoro

min multe pli utila al la movado kiel oficisto ol kiel estrarano.” Nun vi estas ĝenerala direktoro de UEA, la plej grava oficisto, ĉu tempo sufiĉas, aŭ eĉ pli ne sufiĉas?

— Nun ĝi definitive ne plu sufiĉas...

Vi laboras en la CO dum pli ol dek jaroj, ĉu vi jam pensas pri reformado de laboro de la CO kaj de UEA?

— Kompreneble estas multaj mankoj, sed ĉefe mankas laborforto pro la limigitaj monrimedoj. La funkciado de la CO ne bezonas kaj eĉ ne toleras radikalan reformon, ĉar ĝiaj ĉefaj taskoj kaj servoj estas tiel bazaj por UEA kaj la tuta movado, ke ili ne povas rapide ŝanĝiĝi. Aliflanke daŭre okazas malgrandaj ŝanĝoj, tiel ke multilate nia laboro nun malsamas kompare kun la tempo, kiam mi eklaboris. La oficejo nun estas multe pli efika ol tiam. Imagu, ke antaŭ dek jaroj nia komputilo bezonis unu horon por fari membrostatistikon. Nun ĝi faras ĝin en kelkaj sekundoj. La ĉefaj ŝanĝoj, kiuj atendas nin en proksima estonteco, devenos el la eblecoj de interreto, al kiu la CO cetere aliĝis jam fine de 1992. Se temas pri la tuta UEA aŭ nia movado ĝenerale, ankaŭ ĝi ne bezonas grandan reformon. Esperantistoj nur bezonas vekigi, ĉar tro multe oni dormas. Tial la Komitato nun preparas Kampanjon 2000, kies celo estas levi ĉie la idean kaj organizan nivelon de nia movado. La unua paŝo en tiu direkto estis la publikigo de la Manifesto de Prago, kiu ricevis entuziasman akcepton ĉie. Post Prago mi estas eĉ pli optimisma ol antaŭe.

Dum volontulado en la CO, mi rimarkis, ke la oficistoj estas tre okupitaj, iuj eĉ ne povas ferii dum kelkaj jaroj, kvankam ili rajtas ferii, kaj vi daŭre laboras post la laborhoroj, eĉ ankaŭ en sabato kaj dimanĉo... Ĉu tion bone scias la esperantistaro, aŭ ekzistas miskompreno de iuj UEA-membroj pri la peniga kaj sindonema laboro de CO-oficistoj?

— Ĝenerale la esperantistoj scias tion kaj eĉ espri-

mas sian apogon kaj kuraĝigon en diversaj manieroj. Inter ili estas tiel noblaj homoj, ke oni volonte forĝas la oficialajn limojn de labortempo, kvankam mi ja devas sincere diri, ke kelkfoje estus tamen bone memori ilin...

Via nomo “Osmo Buller” signifas “juna bela bovisto”, ĉu vi pensas pri iama adiaŭo al la CO-laboro, aŭ vi restos en la CO kiel ĉiama juna bela bovisto?

— Venos iam la adiaŭo, ĉar mi deziras profesie labori ankoraŭ en mia propra lando. Mi deziras tiam ankaŭ denove aktivi por Esperanto sur loka nivelo, ĉar en ĉiu movado la bazo estas la plej grava ĉenero. Sed mi neniam perdos mian amon al la mirinda urbo Roterdamo, eĉ se mi tamen preferas arbojn al urboj...

Delonge vi estas sekretario de Belartaj Konkursoj, kaj vi aĉetas preskaŭ ĉiun novan libron en la libroservo, ĉu tio signifas, ke vi tre ŝatas literaturon kaj kontribuas al E-kulturo per via laboro por Belartaj Konkursoj?

— Jes, mi ĉiam ŝatis literaturon, kaj mi ege bedaŭras, ke mia laboro ne lasas al mi tempon ekz. recenzi librojn. Ankaŭ la taskon de sekretario de Belartaj Konkursoj mi intencas baldaŭ forlasi, kvankam inter ĉiuj miaj movadaj taskoj ĝi eble estis la plej fascina ĝis nun.

Ĉu vi povus diri, ke vi estas leganto de EPĈ? Tre bonvenas proponoj de vi, profesia esperantisto.

— Jes, mi estas abonanto de EPĈ jam ekde 1968. En la jaroj de la Kultura Revolucio EPĈ kaŭzis al mi embarason, ĉar de ĉiu numero oni sendis al mi 18 ekzemplerojn, kvankam mi estis la sola esperantisto en la tuta regiono... Post tiu tempo EPĈ multe evoluis kaj mi vere ne scias, kion alian konsili al vi ol emfazi la gravecon de daŭra kontakto kun legantoj, ĉar ili estas por vi la bazo.

Kiel vi opinias pri la eblaj IJK 1998 en Pekino kaj UK en la komenco de la 21-a jarcento ie en Ĉinio?

— Mi estis oficisto de UEA en la tempo de la unua ĉina UK kaj mi volonte estus ankaŭ en la tempo de la dua. Do, mi esperas, ke via invito ne prokrastiĝos! IJK en Ĉinio estas eĉ pli urĝa necesajo, ĉar via lando ankoraŭ mankas en la IJK-historio.

Ĉu ankaŭ iu alia komitatano volontulis en la CO?

— Estis jam multaj volontuloj, kiuj iam poste fariĝis komitatanoj de UEA. Vi tamen estas la unua, kiu samtempe volontulis kaj komitatanis, almenaŭ se temas pri iom longtempaj volontuloj. Mi estas ege danko al EPĈ kaj ĈEL, ke ili sendis al ni tiel diligentan laboranton!

*Yu Tao, vicdirektoro de la traduka sekcio de “El Popola Ĉinio” kaj prezidanto de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio. Tuj post la 81-a UK en Prago li laboris tri monatojn kiel volontulo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

ESP-NOVAĴOJ

ĈINIO

● Por festi la 15-an datrevenon de la fondiĝo de la Societo "Amikoj de Esperanto", ĉ. 50 esperantistoj kunvenis en Pekino la 18-an de decembro 1996. Dume fondiĝis la Ĉina E-Biblioteko, la unua en Ĉinio. Ĝi posedas pli ol 3 000 Esperantajn librojn kun 1 600 titoloj, eldonitajn de Ĉinio kaj aliaj landoj. (Wang Jianbing)



"Amikoj de Esperanto" festanta sian 15-jariĝon

● Dum la 5-a Kongreso de la Ĉina Verkista Asocio (ĈVA) s-ro Bakin, honora prezidanto de la Ĉina E-Ligo (ĈEL), estis reelektita kiel prezidanto de ĈVA kaj elektita kiel honora komitatano de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondo. S-ro Chun-Chan Yeh, honora prezidanto de ĈEL, kaj veterana esperantisto Ge Baoquan (Ge Baŭĉjŭan) fariĝis konsilantoj de ĈVA.

(Wang Jianbing)

● Oktobre de 1996 s-ro Peng Zhengming (Peng Ĝengming), mastro de E-domo de Donghu en Wuhan, Hubei-provinco, aligis sian komputeron al interreto. Tio ebligis al la Hubei-a E-Asocio havi ankaŭ elektronikan eldonon de la literatura E-periodaĵo "Penseo". Bonvenaj estas elektronaj poŝtaĵoj pri Esperanto el la tuta mondo. Ret-adreso: dedhea@public.wh.hb.cn. (Peng Zhengming)

● La 9-an de decembro 1996 Hongkong-aj esperantistoj kunvenis en la Urba Universitato de Hongkong okaze de la 2-a datreveno de la fondiĝo de la Hongkong-a E-Asocio. Oni elektis ĝiajn novajn estraranojn. S-ino Eruda Li estis elektita kiel ĝia prezidanto kaj s-ro Werner kiel ĝia ĝenerala sekretario. (Eruda Li)

JUGOSLAVIO

● Antaŭ nelonge Esperanto-organizaĵo en Zajeĉaro de Jugoslavio festis sian 40-an datrevenon. En la solenaĵo partoprenis ankaŭ esperantistoj el aliaj lokoj. En la pasintaj 40 jaroj la aktivado de la nomita organizaĵo estis aldirektita al la disvastigo kaj uzo de Esperanto en internacia komunikado kaj plifortigo de la E-movado. Estis organizitaj multaj E-kursoj, en kiuj partoprenis pli ol mil gejunuloj kaj

urbanoj.

(Resavka Milijic)

ITALIO

● Neniame estas malfrue eklerni Esperanton! En nord-itala urbeto Fidenza, Renzo Sommi, loka delegito de UEA, organizis E-kurson ĉe Universitato Tria Aĝo (Maljunuloj). (Renzo Sommi)



Membroj de la E-kurso ĉe Universitato Tria Aĝo

BELGIO

● Milito ne malaperis el nia terĝlobo. Esperantistoj, laŭ difino, estas humanistoj kaj povas ludi certan rolon en defendado de la paco, kune kun ĉiuj pacamaj fortoj. La idealo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) respondas al la profunda porpaca aspiro de multaj samideanoj. Oni decidis rekonstrui MEM. Por tio estas planite krei tutmondan adresaron de ĉiuj, kiuj sin konsideras kiel pacistojn, sukcesi la 14-an "Ĝeneralan Konferencon de MEM", kiu okazos la 17-18-19-an de majo 1997 en Budapeŝto kaj kiu certigos la reaktivadon de MEM, kaj regule eldoni "Paco" kiel eble plej rapide.

Subteno, morala aŭ financa, estas kore petata. Bonvolu sendi viajn reagojn al: Claude Glady, rue de la Marne 36, 1030 Bruxelles, Belgio. Telefon- kaj faks-numero: (02) 242-49-86. Retpoŝto: cglady@arcadis.be. (Claudy Glady kaj Yu Tao)

ĈEĤIO, HUNGARIO KAJ SLOVAKIO

● 06.-09.05.1997: Antaŭkongreso de la 49a IFEF-kongreso, Ĉeĥio. Informoj: Ladislav Lani, CK Moravie, Naves svobody 14, CZ-78371-Olomouc.

07.-10.05.1997: Amika Renkontiĝo antaŭ la 49a IFEF-kongreso, Hungario. Informoj: Veme (Dr. Jozsef Halasz), Muhely u. 14, Hu-3529-Miskolc.

10.-17.05.1997: 49a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio. Košice, Slovakio. Informoj: Inĝ. Magdalena Feifiĉova, A. Bernolaka 25/5, SK-01001-Žilina.

17.-24.05.1997: Postkongreso post la 49a IFEF-kongreso, Tatranska Lomnica (Altaj Tatroj), Slovakio. Informoj: Inĝ. Magdalena Feifiĉova, A. Bernolaka 25/5, SK-01001-Žilina.

Ŝadman kaj Ĝazira

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LIU SIGONG



ANTAŬ mia intervjuo kun kazaha esperantisto Ŝadman mi telefonis al li kaj demandis lin, ĉu li konas kazahinon Ĝazira, kiu iam skribis al mi leterojn el malproksima Ili en Xinjiang (Ŝingĵang). Li respondis al mi, ke ŝi estas lia edzino. Tio ege surprizis min. Septembre de 1996 mi intervjuis ilin en Urumqi, ĉefurbo de Xinjiang.

Tiutage mi frapis je la pordo de ilia loĝejo. Iu bela virino ĝin malfermis. Sur la fronta muro de la salono pendas ruĝa tapiŝo kaj sur alia muro — granda foto, en kiu estas ĝentila sinjoro Ŝadman en eŭropa kostumo kaj apud li staras novedzino nupte vestita. Ŝi estas tiu, kiu malfermis al mi la pordon. Mi premis ŝian manon kaj diris: “Vi estas Ĝazira, la edzino de Ŝadman?” Ŝi ridetis: “Bonvolu sidiĝi. Li revenos momenton poste.” Ŝi forprenis blankan tukon de sur longa tableto plena de pomoj, vinberoj, bombonoj, butero, rostitaj kukoj kaj vino el frukto.

Kun granda ĝojo Ĝazira rakontis al mi siajn am-rilatojn kun Ŝadman. Dank’ al Esperanto ili enamiĝis unu al la alia kaj geedziĝis. En 1986, kiam la 20-jara Ŝadman eklernis Esperanton en universitato, li ankoraŭ ne povis flue paroli han-lingve. Por kazahoj Esperanto estas pli facila ol la han-a lingvo. Ŝajnis, ke Ŝadman havis denaskan amon al Esperan-

to. Du jarojn poste, li mem ekfunkciigis E-kurson kaj inter la kursanoj estis Ĝazira.

Nun Ŝadman laboras en la oficejo de la Urumqi-a Registaro. Li senpage gvidis E-kursojn en alt- kaj mezlernejoj en la urbo. 20 el liaj pli ol 100 kazahaj lernantoj sukcesis en meznivela ekzameno de Esperanto kaj disvastigis la lingvon en Xinjiang. En 1992 Ĝazira, lia plej elstara lernantino, helpis al li gvidi E-kurson. Post sia diplomiĝo el universitato en 1993, ŝi revenis en sian hejmlokon — Ili kaj mem funkciigis E-kurson en la Normala Universitato de Ili. Ŝadman iam veturis al Ili por helpi ŝin. Ĝuste tiam ŝi korespondis kun mi. En 1995 ŝi edziniĝis al Ŝadman kaj poste eklaboris en Urumqi.

Dum nia interparolado Ŝadman revenis kun kelkaj junaj esperantistoj kaj verdstela flago. Evidente tiuj gejunuloj estis bone konataj ankaŭ de Ĝazira. En la salono tuj ekregis vicleco kaj gajeco. Liu Xiaozhe (Liŭ Ŝjaŭĝe), la unua E-instruisto de Ŝadman, diris al mi: “Ŝadman estas la unua kazaha esperantisto en Xinjiang. Li estas multe pli sindonema al Esperanto ol mi. Li ne nur gvidas E-kurson, sed ankaŭ kompilas Esperantajn librojn kaj vortaron.”

Ŝadman elprenis el tirkesto multajn materialojn, inter kiuj estis la de li kompilitaj kaj mimeografitaj instru-materialoj, nomlistoj de liaj E-kursanoj, Esperanta periodaĵo

“Lernado” kune redaktita de li kaj aliaj. Mi foliumis unu el la kajeroj, kun belaj skribaĵoj laŭ la alfabeto ordo. Ŝadman diris al mi, ke tio estas la tria manuskripto de Esperanta-kazah-a vortaro, kiun li kompilas. Tiu vortaro kun 15 000 vortoj estos kompilita ĉe la fino de 1997. “En 1991 mia koresponda amiko el Turkio sendis al mi turkan vortaron kaj kelkajn lernolibrojn en Esperanto kaj turka lingvo, el kiuj mi rimarkis, ke la pens- kaj esprimmanieroj de turkoj similas al la niaj. Do, surbaze de lia sendaĵo mi ekkompilis instru-materialojn kaj Esperanta-kazahan vortaron. Mi intencas kompili ankaŭ vortaron turka-Esperanta-kazaha-rusan.”

Li daŭrigis kun memfido kaj firmeco: “Kazahoj plejparte vivas en bela paŝtejo. Ili ne nur lertas en kantado kaj dancado, sed ankaŭ havas longajn tradiciojn medicinan kaj sciencan. Mi instruas Esperanton kaj kompilas vortaron, por ke pli da kazahoj konu la eksteran mondon kaj konigu al la tuta mondo la brilan kaj riĉan kazahan kulturon.”

Ĝazira esprimis, ke ŝi daŭre tutforte subtenos sian edzon en lia afero, kiu fakte estas ankaŭ la ŝia. Rigardante sian afablan edzinon, Ŝadman montriĝis iom fiera: “Ĝazira parolas han-lingve kaj Esperante pli bone ol mi. Mi certe progresos sub ŝia helpo!”

La ĉeestantoj laŭdis, ke ili estas ideala paro, ĉar ili forte inklinas al Esperanto. ■




S-ro Ŝadman (la tria de maldekstre) kaj s-ino Ĝazira (la kvara de dekstre) inter samideanoj de Urumĝi



Ŝadman kaj Ĝazira kaj iliaj gepatroj



S-ro Ŝadman instruas Esperanton.



Ŝadman kaj Ĝazira

S-ro Ŝadman (la dua de dekstre) kaj liaj gastoj



El nebulo de miaj rememoroj

de HALINA JURSKA-BEREZOWSKA*
(Pollando)

MIAJ rememoroj estas, kiel sidera polvo. Nur homa memoro gardas en sia trezorejo plej belajn momentojn el nia vivo. Pro tio mi ĝis hodiaŭ ne povis forgesi belecon de kvar jarsezonoj — infanoj de ĉarma sorĉistino-naturo. Mi plektas revon, ke revenos ankoraŭ bonaj tempoj. Iafoje la ritmo de mia koro haltas por momento. Tiam ŝajnas al mi, ke ĝi komprenas, kiel grandan potencon de strangaj sorĉaĵoj posedas naturo.

PRINTEMPO. Vekiĝis Dormanta Princino kaj alvenas en belegaj vestoj. Matene freŝa venteto karesis vizaĝon, alte sub la ĉielo kantas alaŭdoj, alflugas cikonioj kaj sturnoj. La herbejojn kovras verda, floriĉa tapiŝo. En parko inter putraj folioj troviĝas tre aromaj violoj. En malgrandaj flakonoj hejme bonodoras tiel, ke oni povas pripensi, ke iu elverŝis grandan botelon el parfumejo. Ekstere la suno varmigis la teron, kaj komenciĝas regado de naturo.

ĈARMA NATURO! Kie perdiĝis tiaj printempoj. Kiam naturo vekigi el revoj?

SOMERO. Suverena Princo paŝis en parada vesto kaj fascinas. Ordantaj grenokampoj kun cejanoj, papavetoj, agrostemoj, kamomiloj inter spikoj estis certe escepta teksaĵo. Zumas abeloj, flugas papilioj — gvardio de Princo. Se hirundoj — heroldoj de tempesto flugas tre malalte, oni povas atendi, ke baldaŭ estos tondroj kaj pluvego. Poste aperas ĉielarko sur la ĉielo. La fenomeno daŭras mallonge, sed la okuloj ĝuas tian vidaĵon. Kion mi memortenas ankaŭ? Arbaro, de kie mi alportis plenan krucon, en kiu estis maturaj tre aromaj fragoj. Post reveno elŝutitaj sur granda plado la fragoj havas intensivan, ebriigan bonodoron. Ĝi jam ne ripetiĝis. Tamen ĝian neĉiutagan efekton malfacile forgesi.

MALAVARA NATURO! Ĉu jam ne revenos sunaj someroj kun fulmotondroj, varmegaj tagoj?

AŬTUNO. Sinjorino-Pentristino havas tutan kolorgamon kaj ornamis riĉe foliojn de arboj kaj arbustoj. En parko susuras sub piedoj sekaj folioj, kvazaŭ ili dezirus rakonti pri arbara vivo kaj anonci finon de aŭtuno. Ĉu oni povas deŝiri rigardon? Por ni estas donaco — ruĝaj sorphaj koraloj kaj fruktoj de sovaĝaj rozoj. Tiel adiaŭis nin aŭtuno. Ĝi deziras postlasi plej neforgeseblajn impresojn en nia koro. Flugas ĉe la ĉielo grupoj kaj sovaĝaj anseroj. Mi longe staris kaj fiksis rigardon sentimentalane. Ĝis revido!

BELEGA NATURO! Elsorĉu ĉiam belajn kolorojn Kaj aldonu riĉajn verkojn!

VINTRO. REĜINO de NEĜO sendas, sendas siajn rajdantojn sur blankaj ĉevaloj — Matene ĉiuloke blankeco ŝokas. Neĝos kaj neĝos senpaŭze. Nokte eĉ frosto ne mallaboris. Ĝi, senekzempla pentristo-lernanto de vintro, kreis belajn florojn sur fenestrovitroj. Vespere dum promenado la neĝo knaris sub piedoj. Lunlumo transportas nin en fabelan mondon. Neĝoblankaj steletoj falas, sed tre rapide pereas sur niaj vestoj. Mi pensas, ke artisto ne volas, ke iu povu imiti subtilajn desegnojn. Mi rimarkis, ke ĉia steleto estis tute varia. Vintro havas nekaptetblan specifan sekreton. Neniu povas tion ĝisfunde sondi. Sendube la vintraj kreintoj deziras konvinki nin, ke tia jarsezono scipovas fari plezuron kaj impreson.

MIRAKLA NATURO! Revenu en blankaj vestoj! Malavaru neĝajn pejzaĝojn!

Nun mi estas kun nostalgio en koro kaj trankvileco rare gastas, ĉar nur malmultaj inter saĝaj homoj pensas, kiel turni tragedion. Ĝi estas grava. Ankoraŭ ne estas malfrue. Neniigi totale ion estas rapide, sed restarigi neeble. Mirakla horloĝo de naturo jam ne mezuras tempon de alveno de jarsezonoj. En novtempa mondo valoras pripensi pri multaj sciencistoj el diversaj disciplinoj. Kaj oni povas konstrui gigantan horloĝon elektronikan. Ĉiu el ni, se deziras vivi sur nia planedo feliĉe, devas fervore ami, protekti kaj savi naturon. Komencu

ekde hodiaŭ. KREDU kaj batalu! Naturo atendas.

*La aŭtoro naskiĝis en 1922 en Krakovo, Pollando. Ĝis 1941 ŝi loĝis kun siaj gepatroj en malgranda urbeto Scucin (Szcuczyn) en la orienta parto de Pollando. Deviga restado en 41-46 en Siberio forstrekis ŝian revenon al sia amata urbeto kun tre belaj pejzaĝoj de naturo. Ŝi esperantistiĝis en 1983 kaj instruas Esperanton hejme senpage por propagandi la internacian lingvon.

La neatendita

de **CLAUDE SCHROEDER*** (Francio)

Tiumatene,

*Je la horo kiam ankoraŭ l' homa tero dormas,
Nure incidenta faldo sur l' surfaco rigida*

De la ŝtona dormo de la mondo,

Jen,

*Lante videbliĝante tra la lastaj noktaj ombroj,
Senhaste malgluiĝante el kimeraj foraĵoj,
Dum apenaŭ ekplenumas tra la ĉielo ĝian*

kurson

*Pala suno ankoraŭ tut' humida pro la mara
ŝaŭmo,*

Jen,

*Reĝe sed ŝtele, kiel evitema batalanto lacega,
Tamen surŝprucigita laŭlonge de senhoma ĝeto
De la tute unua rideto de l' infana tago,*

Jen,

*En l' havenon silke englitante anonime
Dank' al nevidebla silentema ŝipanaro sperta,
Nu, ja ŝtele, kvazaŭ fuĝante de ia svaga kulpo,
Ne plu eskortita tradicie*

De la ĝoja svarmo de la tiom blankaj mevoj,

*Ja ŝtele, kiel la timindaj ŝarkoj de antaŭaj
marmilitoj,*

Ruzaj masakristoj de senkulpaj kargoŝipoj,


Kaj kruelaj lertaj bruligantoj de konvojoj

*— Ho! la vizaĝoj nigraj de la homoj en la maro
kiu brulas!*

Revenante finutritaj de dubinda gloro,

Jen,

*Forgesita komplico de pentintaj murdistoj,
okaze viktimo ilia,*



La aŭtoro

*Nuntempe portanto pacema de la vigla viv-
esenco,*

Jen,

*Majestega kvankam vundeblega, solenega
kvankam anonima,*

La longa ŝtala ŝipo kun impona kastelo poba,

*La senfama petrolŝipo, kiu venas, sen vivoj
nek fanfaroj,*

Nek saluto basa kaj solena de l'muĝila ĥoro,

Alporti al l' homaro, kaptitan en ĝiaj flankoj,

La dikan, valoregan, fabelan sangon nigran

Kiu malvareme morgaŭe nutros

L' arterian reton de la mondo.

*La aŭtoro naskiĝis en 1930 en la sudorienta ĉirkaŭurbo de Parizo. Li iĝis en 1951 instruisto pri la franca lingvo k. literaturo en teknikaj liceoj kaj en 1965 pri psikopedagogio en pariza lernejo normala por estontaj instruistoj pri teknikaj disciplinoj. Li havas du filinojn kaj kvar genepojn. Li emeritiĝis en 1990. Li nuntempe trankvile vivas kun sia edzino proksime de Auxerre, dua granda urbo de Burgonjo.

Lerni parolon

de DAI MINGZHONG

IU 6-jara knabino demandis sian patrinon: "Ĉu la floroj scipovas paroli?"

"Certe, mia kara. Se ne, printempò estus silenta kaj neniu dezirus ĝin."

La knabino ridetis kontente.

Kiam la knabino estis 16-jara, ŝi demandis sian patron: "Ĉu la steloj en la ĉielo scipovas paroli?"

"Kompreneble ne, mia kara. Se jes, la ĉielo estus brua kaj neniu ŝatus ĝin."

La knabino denove ridetis kontente.

Ŝi fariĝis 26-jara kaj edziniĝis. Foje ŝi demandis sian edzon: "Ĉu mi bone agis dum la hieraŭa komuna vespermanĝo?"

"Tre bone, mia kara!" la edzo respondis ĝoje kaj fiere. "Vi parolis kiel frustranta fontakvo kaj bela muziko. Vi silentis kiel bonodora teo kaj gracia gruo. Vi ne parolis, sed viaj okuloj estis signifoplenaj. Mia kara, de kiu vi lernis parolon?"



Ŝi ridetis: "Kiam mi estis 6-jara, mia patrino, kiu estis instruistino, instruis min paroli kun la naturo. 16-jara, mi lernis de mia patro, kiu estis verkisto, kiam oni devas paroli kaj kiam ne. Antaŭ ol renkonti vin,

mi lernis parolon de historiisto, filozofo, literaturisto, muzikisto, pentristo... Post konatiĝo kun vi mi lernis de vi pensadon, saĝon, kuraĝon kaj amon." ■

EN ANTIKVAJAJ BAZAROJ DE PEKINO

Teksto kaj fotoj
de HAN HONG

Antikvaĵoj ĉiam estas ŝatataj de ĉinoj. En la pas-inteco kolekti antikvaĵojn estis hobia nur de tiuj ĉinoj, kiuj estis alte klerigitaj kaj multe salajrataj. Sed nun tio estas hobia ankaŭ de ordinaraj ĉinoj.

Kiam oni havas pli da mono, oni turnas sian atenton al antikvaĵoj, ke en Pekino tago post tago prosperiĝas antikvaj bazaroj. Krom la antikva bazo Liulichang kun longa historio, funkcias en la urbo ankaŭ aliaj dekelkaj tiuspecaj bazaroj.



Ĉe tagiĝo en semajnfino multaj venas al la antikva bazo Panjiayuan en orienta Pekino, kie oni vendas pentraĵojn, kaligrafiaĵojn, porcelanaĵojn, bronzaĵojn, monerojn kaj multajn aliajn antikvaĵojn. Inter la vizitantoj estas spertaj kolektantoj de antikvaĵoj, laboristoj, direktoroj de kompanioj kaj ankaŭ alilandanoj el ambasadorejoj en Pekino.

Ifoje okazas, ke iuj vendas malbonkvalitajn kaj eĉ falsajn antikvaĵojn. Tial la vizitantoj devas havi fakajn sciojn por ne esti trompitaj en aĉetado de antikvaĵoj. Kompreneble, oni ĝojas, se oni povas aĉeti aŭtentikan antikvaĵon je malalta prezo.




Hezito

**“Kiu el ili
pli bela?”**




Serioza kliento



Tia prezo-indiko komprenebla por alilandanoj



En antikvaĵa bazaro de Pekino



Ekspertizo



Interesiĝas ankaŭ alilandano.

Kursoj de ĉinaj mezlernejoj*

de PANG NAIYING

Ni petas vin skribi al ni pri lernado en la 3-a klaso de via mezlernejo: kiajn lernobjektojn ili lernas? Ĉu ili lernas senpage? Ĉu oni lernas la rusan lingvon?

Interklubo "E-to", Juna Grupo (Rusio)

EN Ĉinio mezlernejo aplikas 6-jaran edukosistemon, t.e. 3 jaroj por malsupera mezlernejo kaj 3 por la supera kun minimume 33 lernohoroj semajne kaj 12 devigaj lernobjektoj: politiko, ĉina lingvo, matematiko, fremda lingvo, fiziko, kemio, biologio, historio, geografio, korpa kulturo, arto kaj teknologio. La lernobjektoj de la 3-a klaso estas similaj al tiuj de aliaj klasoj kaj diferencas de ili nur en have kaj grade.

Pro tio, ke la mezlerneja periodo estas grava por formiĝo de scio-strukturo, oni donas apartan atenton al la instruado de fundamenta teorio kaj scioj en multaj kampoj. Laŭ tiu celo oni aranĝis la kursojn por mezlernejoj. En la lastaj jaroj ĉinaj mezlernejoj pli kaj pli atentis kulturadon de persona kapablo de lernantoj, ĉar en la informa epoko mezlernejo ne povas doni al ĉiuj lernantoj sciojn por la tuta vivo. Tial estas tre grave multe kulturi la kapablon de lernantoj mem havigi al si kaj krei apliki novajn sciojn. Pro tio instruistoj diras al novaj lernantoj en ilia unua tago de la semestro, ke la venontaj analfabetoj estos tiuj, kiuj ne scias lerni, kvankam klerigitaj.

Tiel, mezlernejoj strebas, por ke lernantoj bone lernu sciojn kaj metodojn de memlernado en kreiva instruado. Ekz., iuj mezlernejoj komencas geometrian lecionon per 7-peca puzzle, kiu aperis en Song-dinastio antaŭ pli ol mil jaroj. Antikvaj ĉinoj tranĉis kvadratan kartonon en 7 simplajn geometriajn figurojn kaj formis el ili sennombrajn bildojn. Absorbiĝinte en tiu ludo, mezlernejoj komponas el ili diversajn interesajn bildojn, kiaj "Legado", "Balaado", "Tajpado", "Kurado", "Cirka Spektaklo", "Sagpafado", "Saluto al Instruisto", "Korvo kaj Vulpo." En interesa ludo mezlerneja-

noj komencas lernadon de geometrio.

Multe evoluas ankaŭ instruado de la ĉina lingvo. Ekz., antaŭ ol klarigi la prozaĵon "Lotusa Lageto en Lunlumo", instruisto petas lernantojn unue aŭskulti deklamadon kun akompano de muziko kaj poste desegni laŭ la prozaĵo belan lotusan lageton en lunlumo. Inspirate de ĉarmo de la prozaĵo, la lernantoj ne nur lernas la lingvon, sed ankaŭ disvolvas siajn intelekton kaj kreivon.

La kursoj fremdlingva kaj komputora estas plej ŝatataj en mezlernejoj. Kune kun la disvolviĝo de modernaj sciencoj kaj teknikoj kaj oftigi de internaciaj interŝanĝoj, oni pli kaj pli bezonas homojn, kiuj bone scias fremdajn lingvojn kaj lertas en uzado de komputoro. En plejparto da ĉinaj mezlernejoj funkcias fremdlingvaj kursoj, en kiuj oni instruas la anglan lingvon pro la bezono de la merkato. Funkcias ankaŭ kursoj de la rusa lingvo en mezlernejoj, precipe en tiuj de nordorienta Ĉinio, kun ĉ. 28 000 lernantoj. La komputora kurso estas ankoraŭ nedevisa en mezlernejoj. Tamen en iuj mezlernejoj, eĉ elementaj lernejoj kun bonaj kondiĉoj funkcias tia kurso. Laŭ takso, Ĉinio vaste klerigos pri komputoro en la jaro 2000.

Por ke lernantoj ellernu pli da kapabloj, la Ŝtata Eduka Komisiono postulas, ke mezlernejoj funkciigu, krom devigaj, ankaŭ nedevigajn kursojn kaj aliajn aktivadojn. Tio signifas, ke la ĉina eduka sistemo ŝanĝiĝis.

Aliaj aktivadoj ampleksas kunvenojn de lernejo kaj grupo, amuzojn kaj sportojn, trisemajnan praktikadon en kamparo, armeo aŭ fabriko ĉujare. Krome, la lernejoj funkciigas nedevigajn kursojn laŭ siaj propraj kondiĉoj kaj kun diversaj trajtoj. Ekz., por la loka ekonomia disvolviĝo, iuj

kamparaj mezlernejoj funkciigas kursojn de hortikulturo, korto-ekonomio kaj plektado per bambuo aŭ pajlo.

La 35-a Mezlernejo de Pekino klasifikis siajn nedevigajn kursojn en 3 kategoriojn: la unua estas perfektiga kun instru-enhavo pli riĉa kaj nivelo pli alta por kulturaj elstarajn lernantojn por supera mezlernejo kaj altlernejo; la dua konsistas el scienc-teknika laboro kaj biologia eksperimento kun la celo levi la intereson kaj kapablon de lernantoj; kaj la tria enhavas muziko-aprecadon, belskribadon, pentradon, dancon, fotadon k.a. kun la celo kulturaj estetikaj senton de lernantoj kaj ilian intereson pri arto.



En la nomitaj kursoj kun 2 lernohoroj ĉiusemaine sen ekzameno, la lernantoj ne nur lernas multe, sed ankaŭ sin malstreĉas. Lanĉado de raketo kaj termobalono estas tre interesa. Lernantoj de la fizika kurso enverŝis akvon en platan botelon, poste pumpis aeron enen kaj fortranĉis la tubon, tiam la botelo kiel raketo ekflugis al la ĉielo. Lernantoj de la kurso de familiaj elektraj aparatoj scipovas uzi kaj ripari diversajn tiajn aparatojn. Lernantoj de la medi-protekta kurso kune kun esploristoj de la ŝtata medi-protekta departemento studas la programon "Kontroli polucion de dekoraciaj materialoj". Ĉiujare antaŭ la Novjara Tago la lernejo okazigas kuirartan konkurson, ifoje eĉ postulas, ke la lernantoj preparu pladon por siaj familianoj, kaj petas iliajn gepatrojn fari juĝon.

Ĉiun semestron la lernejo faras enketon pri la nedevigaj kursoj. Jen unu el la demandoj, al kiu preskaŭ ĉiuj lernantoj donis pozitivan respondon. "Ĉu la nedevigaj kursoj plaĉas al vi?" Iu lernanto de la korbopilka kurso respondis: "Mi donas grandan atenton al mia kurso, ĉeestas ĝin ĉiufoje kaj diligente lernas ĉiun movon." Sed estas diversaj respondoj al jena demando: "Kiun kurson vi deziras ankoraŭ?" Iu lernantino de la komputora kurso respondis: "Belfiguriga kurso utilas al la korpokreskado. Ĝin bezonas ĉinaj geknaboj de kiu ajn aĝo!" Tamen iu knabo de la muzika kurso senkaŝe respondis: "Ne plu kursojn, jam sufiĉas!" Sed li proponis kurson de aŭto-stirado. Post la enketo la lernejo funkciigos novajn kursojn por kontentigi la bezonon de la lernantoj.


La nedevigaj kursoj funkcias dum la tutà semestro, pro tio, eĉ antaŭ la finaj ekzamenoj oni ankoraŭ vidas, ke lernantoj gaje ludas korbopilkon en sportejo, kaj aŭdas belan muzikon el la aŭditorio...

*Ankaŭ s-ro Vasil Ostrev el Bulgario kaj aliaj legantoj volas informiĝi pri la edukado en ĉinaj mezlernejoj.

PUZLO



"Saluto al Instruisto"



"Luktado"

En urbeto de anasoj

Teksto kaj fotoj de HAN HONG


La urbeto Huaibin situas en sudorienta Henan-provinco, ĉe Huaihe-rivero. En ĝi kruciĝas riveretoj kaj dissemiĝas lagetoj. De la antikveco ĝi estas naturdotita loko por bredi anasojn.

En la pasinteco, antaŭ ol ekveturigi kargoŝipon, oni aĉetis anasidojn por bredi ilin sur la ŝipo. Kiam la ŝipo revenis, la anasoj fariĝis grandaj.

De la lastaj dekkelkaj jaroj

Huaibin-anoj bredas ankaŭ bonrasajn anasojn importitajn el eksterlando kaj ricevas kontentigan enspezon el vendado de ili.

Nun la urbeto havas entreprenon, kiu plenumas serian laboradon — kulturado, kovado, nutrado kaj buĉado de anasoj kaj prilaborado de plumvestoj. Kaj la produktaĵoj havas grandan debiton ne nur en la ĉina, sed ankaŭ en la internacia merkatoj.



Kolektado de anasovoj



Ĉe rivero de Huaibin



Bonrasaj anasoj de alilanda speco



Flegado de anasidoj

YI XIU:

Rakontoj pri la Ĉina Virina Piedpilka Teamo

EN la 26-aj Olimpiaj Ludoj pasintjare, piedpilko, la plej granda sporto-branĉo, unuafoje estis ludata de virinoj. La Ĉina Virina Piedpilka Teamo gajnis arĝentan medalon. Ĝiaj membroj ĉiuj ploris, ĉar por la medalo ili ne nur ŝvitis, sed ankaŭ dediĉis sian plej belan kaj valoran junecon.

La Ĉina Virina Piedpilka Teamo havas membrojn pli aĝajn ol tiuj de aliaj teamoj, do por venko ili devas pli multe sin ekzerci. Ĉiuj junulinoj ŝatas sin beligi, sed la piedpilkistinoj ne havas ŝancon bele sin vesti. Somere ili eĉ ne kuraĝas porti jupon, ĉar ili devas kuradi sub arda suno — kaj sekve havas sunbrunan haŭton, kiu estas ne bela laŭ la ĉina vidpunkto; en pluva tago ili sin ekzercas en stadiono, multfoje falis en koton — kaj sekve ricevis vundojn sur la korpo. La ekzercado pri lud-teknikoj estas relative facila, kaj la plej terura estas monotona fizika ekzercado — post diversaj kuradoj la ludistinoj preskaŭ elĉerpiĝis, ili kuŝas sur la ludkampoj kaj ne havas forton eĉ por stari.

Kun grandaj okuloj nigraj kaj brilaj, ronda vizaĝo ĉiam ridetanta, Wei Haiying estas la plej bela ludistino en la teamo. En la duonfinalo de virina piedpilka konkurso de la 26-aj Olimpiaj Ludoj, en la lasta partio la ĉina teamo estis en postĝinta situacio de 1:2, la trejnisto sendis ŝin al la ludkampoj. Ŝi dufoje piedĵetis la pilkon en la golejon en nur sep minutoj, ke la ĉina teamo venkis. Ĉu vi kredas, ke tiu elstara piedpilkistino eĉ ne havis tempon por okazigi sian geedziĝan solenon? Antaŭ la Olimpiaj Ludoj ŝi estis preta ĉesigi sportadon pro nekonvena aĝo kaj edziniĝi al Aming, al kiu ŝi enamiĝis antaŭ du jaroj. Ĝuste tiam la teamo revokis ŝin por la konkurso. Ŝi ne volis, ke la geedziĝa ceremonio okupu la tempon de ekzercado.



Wei Haiying (kun levita mano) ĝojas pro sukceso en la finalo.

Do en semajnfino ŝi kaj Aming, kiu venis de Hongkong, kune tagmanĝis kaj iris al koncerna agentejo por sin registri kaj preni geedziĝ-ateston. Tuj poste, la novedzo akompanis la novedzinon al la ekzercejo, ŝi adiaŭis sian edzon: “Pardonon, Aming.”

La golulino Gao Hong estas la plej kuraĝa en la teamo. En matĉo ŝia kapo koliziis kun la golfosto, sangis la kapo kaj ŝvelis la okuloj. Sed ŝi pene ludis ĝis la fino de la matĉo. En la Mondpokala Virina Ĉampionado okazinta en Svedio, ŝi ekludis kiel la unua golulino de la ĉina teamo de la kvarona finalo. Ŝi bone gardis la golejon en 120 minutoj, kaj en reciproka liber-ŝoto el la punpunkto ŝi sukcesis repuŝi du ŝotojn el la kvin, fine la ĉina teamo iris en la duonfinalon. Estis interesa rakonto: piedpilkistino de la kontraŭa teamo pretis ŝoti el la punpunkto, tiam Gao kun memfido diris: “Mi certe kaptos la pilkon.” La fremdlanda ludistino ne komprenis ŝiajn ĉinajn vortojn, sed eble estis timigita de ŝia fieraĵo. Fine Gao sukcesis.

En la Olimpiaj Ludoj Gao Hong ludis kiel ĉefgolulino de la ĉina teamo. Ŝi malsukcesigis ĉiun ŝoton en sian golejon en la matĉoj kun la usona kaj sveda teamoj kaj bone ludis en la duonfinalo.

Mi devas diri, ke preskaŭ pri ĉiuj aliaj la Ĉina Virina Piedpilka Teamo havas kortuŝajn rakontojn kiel pri Wei Haiying kaj Gao Hong. Eble oni demandos, kial ili tiel diligente sin ekzercis kaj pene ludis en la konkursoj. Ĉu por mono? Kompreneble ne, ili enspezis ege malpli multe ol la membroj de la vira teamo. Ĉu por famo? Verŝajne ne. Mi kredas, ke la kialo estas ke la piedpilkistinoj amas piedpilkon, al kiu ili volontas dediĉi ĉion sian. ■


Oazo en dezerto

Teksto kaj fotoj de HAN HONG


Kiam mi trajne veturis en la suda parto de Tenger, la kvara granda dezerto de Ĉinio, mi vidis, ke la torenta Flava Rivero faris tie S-forman vojon. Sur la senlima dezerto norde de la rivero estas granda oazo: Poploj, dekkelkajn metrojn altaj, kreskas laŭlonge de la fervojo. Sur la ondantaj dunoj vidiĝas tritik-tigaj kradoj, en kiuj kreskas diversaj arbedoj kaj herboj. Jen Shabotou. Tie artefarita flaŭro senmovigis la flusablon kaj efike protektas la fervojon kontraŭ atako de sablo.

Kiam mi metis miajn piedojn sur la oazon, mi renkontis s-inon Liu, prezidanton de la Dezertologia Instituto de Lanzhou, kiu faris tie inspektadon. Ŝi diris al mi, ke antaŭe en Shabotou ĉiam regis trosekeco kaj kreskis neniu planto. Meze de la 50-aj jaroj la fervojo komencita de Lanzhou estis sin etendanta okcidenten al Xinjiang. Pro tio Ĉinio ekhavis eblecon senmovigi flusablon. Sciencistoj kaj laboristoj faris penigan laboron en la senlima dezerto. Laŭ la lokaj kondiĉoj ili elpensis metodon malhelpi fluon de sablo per tritikaj tigoj. Post 40 jaroj la dezerto transformiĝis en vivoplenan oazon. 42% de la dunoj sin etendantaj 40 km estas kovritaj de plantoj. La furioza sablo estas jam firme katenita en la reto formita el tamarikoj kaj peganoj (*Peganum harmala*).

Shabotou fariĝis bela oazo. Tie estas vinber-, pom- kaj legom-gardenoj kaj rizkampoj. Tie vivas ankaŭ leporoj kaj blankaj cigoj.



En meteostacio



En la Dezertologia Instituto de Lanzhou





Shabotou

Vegetaĵo en dezerto



Trajno en oazo






**En vinber-
ĝardeno en de-
zerto**



**Observado de
kreskado de ve-
getaĵo**

Tritik-tigaj kradoj kontraŭ sablo



Jiayuguan-pasejo — la fino de la Granda Muro

Teksto de PANG NAIYING
Fotoj de HAN HONG

KOSMONAŬTO, kiu iam estis sur la luno, diris, ke kiam li rigardis al la tero de la kosmoŝipo fluganta en la spaco, li vidis du konstruaĵojn sur ĝi: la Ĉemara Digo de Nederlando kaj Granda Muro de Ĉinio.

La konstruado de la Granda Muro komenciĝis antaŭ 2 200 jaroj, en la periodoj Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a.K.). Komence diversaj regnoj konstruis altajn urbomurojn por sin defendi. Post kiam la Unua Imperiestro de Qin-dinastio unuigis Ĉinion en 221 a.K., li interligis tiujn urbomurojn por rezisti kontraŭ atako de la nordaj hunoj. Tio estas la Granda Muro 5 000 km longa de Qin-dinastio, komenciĝanta de Lintao (la nuna Minxian-gubernio de Gansu-provinco) en okcidento kaj finiĝanta en Liaoning en oriento.

Por protekti la Silkan Vojon imperiestro Wudi (140-88 a.K. sur trono) de la Okcidenta Han-dinastio plene utiligis la Grandan Muron. Li konstruigis alian parton de la Granda Muro, kiu komenciĝis de la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero kaj, transirante Wushaoling-monton, etendiĝis ĝis la dezerto en Xinjiang. Tio estas la Granda Muro de Han-dinastio. Post la 2 000-jara natura erozio la grandioza Granda Muro plejparte detruigis.

Post Qin kaj Han ĉiuj dinastioj

plilongigis kaj riparis la Grandan Muron. La plej impona estas la Granda Muro plilongigita de Ming-dinastio antaŭ 400 jaroj. Ĝi, 7 000 km longa, startas de Yalurivero en oriento, etendiĝas okcidenten kaj, kunligiĝinte kun tiu konstruita en Han-dinastio, finiĝas ĉe Jiayuguan-pasejo, je 25 km okcidente de Jiuquan.


SERURO DE LA SILKA VOJO


Gobio ruĝis ĉe la sunsubiro kaj la impona Jiayuguan-pasejo kvaŝaŭ brulis. Ankaŭ la Granda Muro ambaŭflanke de la pasejo estis ore garnita. Ĝi etendiĝas ambaŭflanken: Sude ĝi preteriras neĝakvan riveron ĉe la piedo de Qilian-montaro kaj norde ĝi sin

kroĉas al la krutaĵo de Heishanmonto kaj formas pendantan muron. La Granda Muro ambaŭflanke de la pasejo, kiel giganta seruro, defendas ĝin sur la Silka Vojo 15 km larĝan de sude norde.

Tie, kie staras la kastelo Jiayuguan, antaŭe sterniĝis dezerto. Post malfermo de la Silka Vojo la kortego de Han-dinastio metis garnizonon tien kaj ne starigis kastelon. La kastelo Jiayuguan kun areo de 34 000 kvadrataj metroj aperis en 1372, kiam regis Ming-dinastio. Ĝi estis bone aranĝita. Ĉe la kvar anguloj de la altaj ĉirkaŭmuroj staras gardoturoj. Generala oficejo, municiejo kaj grenejo troviĝis en la interna parto ĉirkaŭita de meza kaj ekstera partoj. En la

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





interna parto ĉeval-irejo kondukas al la muroj de la kastelo. La muroj estas 10 m altaj kun larĝa supro por ĉevaloj kaj veturiloj. Oni diris, ke la tiama arkitekto kalkulis la konstrumaterialojn ekzakte. Post finkonstruiĝo de la muroj restis nur unu briko.

Fakte, la kastelo Jiayuguan estas ankaŭ majstroverko akustike. Se oni frapis ŝtonon ĉe murangulo interne de ĝi, oni do aŭdas kvivitadon. Legendo diras, ke interne de la pordego iam vivis paro da hirundoj. Foje, ili disiĝis pro forta vento en vojaĝo. Kiam la virbirdo reflugis, la pordego de la kastelo jam fermiĝis. Ĝi, forte sopirante al siaj nesto kaj kunulino, frapis sin kontraŭ la pordegon kaj mortis. La birdino, ege malĝoja pro tio, songis, ke la virbirdo diris: "Iru frapi ŝtonon ĉe murangulo! Mi volas diri ion al vi." La legendo aludas la sopiron de la malproksimaj garnizonantoj al la familia kunvivado, tial antaŭ ĉiu militiro ili venis tien por frapi ŝtonon ĉe murangulo kaj fari aŭguradon. Ili opiniis, ke estas bonaŭguro aŭdi hirundan kvivitadon.

RIGORA GARDO-SISTEMO

La gardo-sistemo por la pasejo Jiayuguan estis rigora. Tie mi vidis kupran tali-insignon kun numero kaj la ĉinaj ideogramoj signifantaj defendadon. Sur ĝia dorso estas mulditaj vortoj: "Ĉiuj garnizonantoj senescepte devas porti tiun ĉi atestilon. La malobservanto estos punata. La pruntedoninto kaj pruntepreninto estos same punataj." Loka kroniko notas, ke siatempe la ŝlosilo de la pordego estis tenata de oficiro. Ĉiutage antaŭ la fermiĝo kaj malfermiĝo de la pordego oni devis hisi flagon kaj kanoni por montri la majestecon. Ĉiuj enirantoj devis montri sian ateston kaj rajtis eniri nur post kiam civila oficiro faris kontrolon.

Tiuj reguloj estis faritaj ĝuste

por sekureco de la Silka Vojo. Same stasis la Granda Muro, kiu estis obstaklo por la hunoj, sed helpilo por la komercistoj. En la senlima dezerto alarm-turo funkciis kiel vojmontrilo kaj tranoktejo. Dank' al la garnizonantoj, la homoj kaj varoj estis ekster danĝero.

Jiayuguan-pasejo rigardas okcidenten kun tri ideogramoj Cheng Yuan Men sur la tabulo de la turo, kiuj signifas "bonvenon al malproksimaj gastoj". En Ming-dinastio la registaro difinis, ke por alilandaj diplomatoj manĝado kaj noktado en Ĉinio estis senpagaj. Kaj oficistoj de diversaj postiljonaj stacioj devis akompani ilin ĝis la ĉefurbo. La registaro rekomencis tiujn diplomatojn per objektoj multe pli valoraj ol ties donaco. Tial alilandaj komercistoj ŝajnis sin diplomatoj tributantaj al ĉina suvereno. En Ĉinio ili aĉetis multe da silkaĵoj, teo kaj porcelanaĵoj kaj transportis ilin al sia patrio por negoco.

La Granda Muro estis konstruita en la tempo, kiam oni uzis pikarmilojn en la milito, tamen

kiam finkonstruiĝis Jiayuguan-pasejo, en Ĉinio oni jam uzis pulvon. Ĉiufoje, kiam malamikoj sin direktis al la pasejo, la garnizonantoj batalis kontraŭ ili per blunderbuzoj.


ALARMA RETO

La lignaj slipoj elterigitaj en Juyan notas, ke sur la Granda Muro po 2.5 km estas malgranda alarm-turo, po 5 km granda alarm-turo, po 15 km fortikaĵo kaj po 50 km kastelo. Tio estas reto por milita defendo, en kiu oni komunikis militinformojn per fumo kaj fajro. Jiayuguan-pasejo kiel kastelo estis la lasta alarm-turo en la reto.


La grandaj kaj malgrandaj alarm-turoj estis faritaj el leŭso, kun mallarĝa supro kaj larĝa bazo. Interne de granda alarm-turo estas terdomo, kiu povas enteni 20-30 homojn. Ĉe la alproksimiĝo de malamikoj oni faris fajron nokte kaj bruligis lupan fekaĵon por doni fumon tage. La alarm-turoj devis stafete komuniki informojn kaj neniel prokrasti tion. Tiu metodo aperis unue en la Okcidenta Zhou-dinastio (la 11-a jc — 771 a.K.).




Fosilia brulligno




Jiayuguan-pasejo ĉe sunsubiro Foto de CAO TAIHE



La pendanta Granda Muro



Turo de Jiayuguan-pasejo



La Granda Muro ĉe Yumenguan-pasejo

Ruino de la Granda Muro konstruita en Han-dinastio ĉe Wushaoling-monto

Kompreneble, la komunikado estis multe pli rapida ol tiu farita ĉevalrajde. Imperiestro Wudi siatempe fondis komandan centron sur Ganquan (Ganĉjūan)-monto, nordokcidente de Xi'an, de kiu komenciĝis la Silka Vojo, por rigardi fumon kaj fajron, doni ordonojn kaj fari komandadon. Dum mia vizito mi vidis sennombrajn alarm-turojn. Sur la monto Wushaoling multaj alarm-turoj konstruitaj en Han-dinastio jam ruiniĝis.

Fortikaĵo kun kompletigitaj militekipaĵoj estas malpli granda ol kastelo. De ĝi dependas la proksimaj alarm-turoj grandaj kaj malgrandaj. En strategie gravaj lokoj ĉe la Granda Muro proksime de Jiayuguan-pasejo estas multaj fortikaĵoj kun loĝejoj, tenejoj kaj staloj kaj ekster ili estas kampoj, kanonejoj, soldato-trejnejoj kaj temploj. Je 20 km okcidente de la pasejo troviĝas la fortikaĵo Shuangjingzi, kiu estas destinita por defendi la pasejon. Tuj ĉe leviĝo de fumo kaj fajro la garnizonantoj ekagis al batalo. Oni diris, ke en la fortikaĵo iam estis dekoj da putoj, kiuj lokiĝis unu kontraŭ alia. En unu puto estis akvo kaj en la alia ne. La tieaj garnizonantoj ĉerpis akvon el la veraj putoj. Kiam ili retiriĝis de la loko, ili do kamuflis ilin kaj lasis malkovritaj nur la falsajn. Tiamaniere ili senigis la malamikojn je akvoprovizo. En la komenco de la 20-a jc transloĝiĝis tien 60 familioj. Poste la loko fariĝis tranoktejo de komercistoj. En 1918 preterpasanto trovis, ke tie estas nur du kabanaj kaj unu malmobilizita militisto. Li vivtenis sin per vendado de teakvo. Nun tie verdas kvietaj kampoj, sur kiuj dissemiĝas vilaĝoj.

TERKULTURANTOJ-GARNIZONANTOJ

En la militaj tagoj la garnizonantoj batalis kaj en la pacaj ili terkulturis. Lasi la garnizonantojn terkulturi en la pacaj tagoj estis unu el la strategie gravaj politikoj difinitaj de imperiestro Wudi por protekti la Silkan Vojon kaj tiun

politikon praktikis ĉiuj postaj dinastioj. Oni nomis la garnizonantojn en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero terkulturantoj-garnizonantoj.

Kaj tiuj terkulturantoj-garnizonantoj faris patroladon, terkulturadon kaj bataladon en rotacio.

En Han-dinastio oni sternis tavolon da subtila sablo sur tero interne de la muro kaj en tranĉeo, por ke oni trovu spurojn de tiuj, kiuj sekrete transiris la landlimon. Patrolado estis tasko farenda ĉiutage por la garnizonantoj. Kiam la garnizonantoj de najbaraj alarm-turoj renkontiĝis ĉe la komuna limo, ili devis fari detalan noton respektive sur la atesto de la najbaraj kolegoj, por ke ĉi tiuj transdonu ĝin al sia superulo. Tamen, kelkiam okazis neeviteble io neatendita. Mi legis sur ligna slipo de Han-dinastio: Pro ŝirmo de arboj generalo de iu garnizono ne klare vidis la signalon de la kontraŭa alarm-turo. Li sendis oficiaron informi pri la afero. Kaj la oficiro falis en malamikan embuskon kaj estis kaptita de la hunoj post akra batalo.

Krom terkulturado, la garnizonantoj faris ankaŭ fiŝkaptadon, paŝtadon, konstruadon de tranĉeoj, arbohakadon kaj kolektadon de lupa fekaĵo. Hodiaŭ tie ankoraŭ videblas kelke da fosiliaj arbobranĉoj.

En la ĉiutaga vivo helpis lote elektitaj edzinoj de iuj terkulturantoj-garnizonantoj. Ili preparis manĝaĵojn por la garnizonantoj, flikis kaj lavis iliajn vestojn. En iuj ruiniĝintaj alarm-turoj ĉinaj


arkeologoj trovis ne nur terliton kaj stovon, sed ankaŭ virinajn kapornamaĵojn kaj infanajn ludilojn.

Sur ligna slipo elterigita en fortikaĵo legiĝas teksto pri takso de oficiro pri soldatoj: "Je la 6-a de la kvara monato laŭ la ĉina lun-kalendaro tifo atakis Meng Qing, soldaton de la unua alarm-turo." Fakuloj opiniis, ke tio estis eble registro pri laboro de la soldatoj. Alia slipo tekstas pri nombro de postiljonaj ĉevaloj. La ok inversigitaj literoj T markas ok postiljonajn ĉevalojn.


La garnizonado en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero garantiis sekurecon de la Silka Vojo kaj ankaŭ akcelis la prosperon de la tiea ekonomio.

ELTERIGITAJ FRESKOJ

Nordoriente de Jiayuguan-pasejo kuŝas pli ol 1 400 tomboj, konstruitaj inter 220-420, kun buntaj kaj enhavoriĉaj freskoj en tombaj ĉambroj, kiuj spegulas la



Sub antikva morusarbo



Ĉe Jiayuguan-pasejo



**“Ankaŭ ni petas permeson eliri el la pasejo!”
Foto de CAO TAIHE**



Jange-danco ĉe Jiayuguan-pasejo



Fresko "Preparado de manĝaĵo" en antikva tombo



Fresko "Plukado de morusfolioj" en antikva tombo



Fresko "Ĉasado" en antikva tombo

socian vivon de la loĝantoj en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero en la antikveco. Ili temas pri terkulturado, ĉasado, paŝtado, kuirado, festeno, vinfarado, tualetado, vojaĝo ktp. Tie estas pluraj freskoj pri kulturado de morusarboj kaj bredado de silkraŭpoj. En la freskoj virinoj plukas morusfoliojn, knaboj forpelas birdojn por protekti la morusarbojn, amikoj ludas muzikilojn kaj dancas en morusarbaro. Sur suda muro de grandioza tombo estas freskoj pri silkraŭpaj kokonoj, silko kaj silkaĵoj. Krome, estis elterigitaj ankaŭ silkaĵoj kun diversformaj bildoj, pasamentoj, mamzonoj, jup-zonoj kaj ruĝaj atlasaj ŝuoj. Analizinte tion, ĉinaj arkeologoj konkiudis, ke en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero oni komencis entrepreni bredadon de silkraŭpoj almenaŭ en la 3-5-a jc, kiam ĉina silko senĉese transportiĝis okcidenten. Antaŭ la unua jarcento eŭropanojn, kiuj neniam vidis silkan produktadon, tiklis interesaj rakontoj pri silka produktado. Iuj diris: "Silko kreskas sur arboj. Oni prenas ĝin de sur la arboj, trempas ĝin en akvo, antaŭ ol fari silkaĵon." Aliaj diris, ke la silkraŭpoj similas al araneoj, kiuj ŝpinas reton sub arboj. Araneoj havas ok krurojn, kaj ankaŭ la silkraŭpoj tiom da kruroj. Estis ankaŭ aserto, ke silko kreskas el la tero... Poste eŭropanoj veturis al Ĉinio kaj de ĝi transportis silkon al Eŭropo. Eble ĝuste tio akcelis la disvolviĝon de la silka produktado en la regiono. Tamen pro klimata ŝanĝiĝo la tiea silkraŭpa produktado ne daŭris plue.

En la vilaĝo Huangcaoying sub Jiayuguan-distrikto ni vidis tri maljunajn morusarbojn. Vilaĝanoj diris: "Ĉe ni restas nur tiuj tri maljunaj arboj. Ili vivis jam plurajn jarcentojn. Ni ne estas certaj, en kiu dinastio ili estis plantitaj. Junie kaj julie ili donas abundajn fruktojn..."

Antaŭe la vilaĝo estis garnizonejo kaj multaj vilaĝanoj estas posteuloj de la terkulturantoj-garnizonantoj. ■

XIA CHUNPING:

MIA UNUA IMPRESO PRI HONGKONG



Tramoj en Hongkong

NE longe post kiam mi alvenis al Hongkong, iu Hongkong-ano diris al mi: "Mi proponas, ke vi prenu tramon por koni Hongkong." Ĉar la tramveturado en Hongkong es-

tas oportuna kaj malmultekosta, kaj plie, la veturlinio de tramo estas plej taŭga por ĝui la pejzaĝon de Hongkong.

En la supra etaĝo de la tramo mia vidkampo fariĝis pli larĝa. Tra

fenestro mi vidis ĉielskrapantojn, vicon post vico da magazenoj, butikoj kaj bankoj, hom- kaj aŭto-fluojn. Kiam la tramo trapasis la parkon Viktoria, la freŝa aero, la vasta piedpilka kampo, la floroj kaj tiel plu sentigis min kvazaŭ en ĝardeneska urbo. Kiam la tramo iris en Causeway Bay (Tongluowan), mi vidis, ke la homoj kaj aŭtoj svarmas sur la strato, kaj nia tramo ne povis ne malrapidigi sian veturadon. Ŝajne, el tio videblis, kia estas "paradizo de varoj": Unu apud alia staras ĉenvendejoj de mondfamaj varoj, ekz., kostumoj kun markoj Giordano, Krokodilo kaj Nike, video-registratoroj kaj fotiloj kun markoj Nikon, Mimon-ta, Konica kaj Sony; kaj la famaj orvendejoj Chow Dahfu, Chow Sangsang kaj She Rueylin.

Ni veturis dekkelkajn minutojn okcidenten de Tongluowan kaj atingis Zhonghuan, la koron de Hongkong. Ambaŭflanke de la strato estas domoj altaj kiel mont-pinto. Tie situas financa kvartalo, en kiu estas pli ol 180 bankoj de la mondo. En ĝi multaj mondfamaj kompanioj kaj konsorcioj posedas la plej imponajn domegojn de la mondo. En ĝi estas ankaŭ novaj kaj malnovaj konstruaĵoj en diver-

saj stiloj, kiaj eŭropstilaj preĝejoj kaj eŭrop-japan-stilaj rezidejoj. Kompreneble, Zhonghuan, sopirata de multaj homoj, apartenas nur al sukcesintaj komercistoj kaj altrangaj administrantoj.

En la tramo sidis 70-80 personoj el Eŭropo, Ameriko, Sudorienta Azio kaj el aliaj lokoj de Ĉinio. Ili, malsamhaŭtkoloraj kaj diversmienaj, vojaĝis en Hongkong, kun fotiloj kaj en turismaj ŝuoj.

La Hongkong-aj pasaĝeroj vivas alimaniere. La oka kaj naŭa matene estas pinthoroj por veturado al laboro. Iuj maljunaj pasaĝeroj legas ĵurnalon, aliaj aŭskultas radio-programerojn. Multaj junuloj ĝuas muzikon, batante la taktan. En la tramo de tempo al tempo aŭdiĝas paroloj per portebla telefono. Kompreneble, inter la pasaĝeroj ne mankas dormetantoj. Kiam la tramo atingas stacion, la pasaĝeroj haste eliras el ĝi, kio montras la streĉan vivon de Hongkonganoj.

Antaŭ ol mi alvenis al Hongkong, mi opiniis, ke Hongkonganoj domaĝas tempon kiel oron kaj neglektas humanecon. Post kiam mi trame veturis, iom post iom paliĝis mia impresoj pri Hongkonganoj. Iun pluvan matenon mi ve-

turis per tramo. Kiam la tramo haltis ĉe stacio, de la supra etaĝo malsupreniris maljuna blindulino, kiu paŝis al la kaso, metis mone-rojn en ĝin kaj hezitis eltramiĝi: Ŝi ne havis pluvombreton. Tiun momenton, iu mezaĝulo en purpura pulovero haste starigis, iom murmuris al la stiristo kaj subtenante la maljunulinon eltramiĝis. Li malfermis sian pluvombreton por ŝi. La atendintoj de la tramo jam eniris ĝin, ĉe la antaŭa vojkruciĝo flagris la verda lumo, tamen la tramo ankoraŭ staris en la pluvo, kun pordo malfermita. Iuj pasaĝeroj rigardis la stiriston, dum la lasta ridetis kaj ĵetis rigardon ekster la tramon. Je tio oni komprenis — li estis atendanta la mezaĝulon, kiu kun la pluvombreto en la mano kondukis la maljunulinon sub la aleron de la domo trans la strato. Fininte tion, li rapidis returne al la tramo. Malgraŭ ke minutoj pasis, la pasaĝeroj, ŝparemaj en tempo, neniom plendis kontraŭ li.

Alifojte en profunda nokto, plenuminte ekstran taskon mi trame revenis al la hotelo. Kiam la tramo estis atingonta mian celstacion, laŭ kutimo mi metis mian manon en la monerujon ĉe la talio kaj pretis elpreni 1.2 Hongkongajn dolarojn por la veturpago. Ho ve! Mi rimarkis, ke mi forgesis kunporti la monerujon. Mi tuj elpoŝigis mian monujon. Malfeliĉe, en ĝi estis nur kelkaj monbiletoj ĉiu en valoro de cent dolaroj. En embaraso mi sentis frapeton sur mia dorso. Returninte la kapon, mi vidis junulinon ridetanta al mi: "Bonvolu eltramiĝi!" Samtempe ŝi montris al mi monerojn en la mano — ŝi pagis por mi la veturkoston. Ege kortuŝita, mi plurfoje esprimis koran dankon al ŝi.

Kvankam mi ankoraŭ ne povas detale klarigi al vi, ke Hongkong estas komerca centro de Azio, la plej granda kontenerizita haveno, financa centro kaj grava fabrikada centro en la mondo, tamen mi povus diri al vi, ke Hongkong plenas de humaneco. ■



En magazeno

Perspektivo de la petrola industrio en Ĉinio

de ZHONG SHI


INTERNACIE famaj ekonomikistoj opinias, ke la petrola industrio de Ĉinio ne inklinas al optimismo, ĉar en la lastaj 10 jaroj la petrola prospektorado de Ĉinio ne akiris gravan sukceson. La petrolkampoj en orienta Ĉinio, kies produktokvanto konsistigas pli ol 80% de tiu de la tuta lando, estas jam malmulte produktivaj.

Ĉu grave malpliigos la petrola produktokvanto kaj eĉ elĉerpiĝos la petrolfonto en Ĉinio en la sekvanta jarcento? Aŭtoritataj fakuloj de la ĉina petrolindustria rondo diris, ke de nun ĝis la unuaj jaroj de la sekvanta jarcento daŭre disvolviĝos la petrola industrio de Ĉinio, kaj antaŭvideblas, ke en 2010 la jara petrola produktokvanto atingos 200 milionojn da tunoj.

La menciita cifero montras, ke la jara petrola produktokvanto de Ĉinio kreskos je triono kompare kun tiu de 1996 kaj daŭre okupos tiam la kvinan lokon en la mondo.

S-ro Zhou Yongkang, vicĉefdirektoro de la Ĉina Ĝenerala Kompanio de Petrolo kaj Natura Gaso, diris al mi, ke en Ĉinio jam formiĝis la strategio de la ĉina petrola industrio, t.e. "stabiligi la produktokvanton de la orientaj petrolkampoj kaj disvolvi la okcidentajn". Post prospektorado oni konstatis, ke en Xinjiang rezerviĝas 1.94 miliardoj da tunoj da petrolo. Oni ne faris grandskalan ekspluaton tie, ĉar la ekspluato estis malfacila kaj produktokosto alta. Due, kvankam en la orienta parto de Ĉinio la petrola fonto grave malpliigas, tamen dank' al apliko de novaj teknikoj, oni plene disvolvos la latentajn fontojn, trovos novajn petrolkampojn kaj ekspluatos petrolon en la lokoj, kie oni ne povis fari tion antaŭe pro manko de teknikoj. Ĝuste pro tio la petrolkampoj Daqing, Shengli kaj Liaohe, la unuaj tri grandaj en Ĉinio, povas stabile produkti petrolon ankaŭ en la sekvantaj jardekoj. En 1995 la petrola produktokvanto de Daqing superis 56 milionojn da tunoj, kaj per tio la Daqing-anoj kreis rekordon. La jara produktokvanto de Daqing-petrolkampo estis pli ol 50 milionoj da tunoj dum 20 jaroj, estas antaŭvideble, ke tiu

produktokvanto estos atingita almenaŭ en la venontaj 10 jaroj. En la lastaj 8 jaroj, la jara produktokvanto de la petrolkampo Shengli estis 30 milionoj da tunoj. Kvankam la produktokvanto inklinas al malpliigo, tamen Shengli-anoj havas novan esperon en la maro. En 1996 la petrola produktokvanto en la maro de la petrolkampo Shengli estis ĉ. miliono da tunoj. La petrolkampo Liaohe produktis ĉiujare 15 milionojn da tunoj da petrolo. Trie, maroj abundas je petrolaj riĉfontoj. Ĉinio havas vastan kontinentan breton. En la Orienta kaj Suda Ĉinaj Maroj estas ebleco trovi



Sur petrol-kampo en Taklimakan en okcidenta Ĉinio

grandajn petrolkampojn.

Oni taksis, ke la petrola rezervokvanto de Ĉinio estas 94 miliardoj da tunoj (64 miliardoj da tunoj sur la tero) kaj la rezervokvanto de natura gaso atingis 38 000 miliardojn da kubmetroj (30 000 miliardoj da kubmetroj sur la tero). Nun 18% kaj 3% de ili estis jam konstatitaj respektive. El tio ni scias, ke en Ĉinio ankoraŭ ne kulminis la ekspluato de petrolo kaj kredeble la produktokvanto kreskos daŭre. Ĉinio komencis ekspluati naturan gason nur antaŭ nelonge. Kvankam kreskado de la petrola produktado estas malrapida kompare kun disvolviĝo de la nacia ekonomio, tamen Ĉinio povos kontentigi la bezonon de petrolo kaj natura gaso per sia propra forto. ■

Ekologia agrikulturo sur alkalaj kampoj

de ZHENG ZHENJIE

EN okcidenta Shandong-provinco troviĝas 1 420 hektaroj da agroj, kiuj multe diferencas de tiuj de siaj najbaraj lokoj. Sur tiu tero, sen vilaĝo, etendiĝas kvadrataj kampoj, laŭvice staras arboj, verdas legomoj kaj flavas tritiko. En akvo grasas fiŝoj kaj viglas kraboj. Jen modela loko de ekologia agrikulturo en Yucheng. Oktobre de 1996 en internacia ekologia simpozio ĝi ricevis unuagradan premion de la ekologia programo internacia.

Antaŭ septembro de 1995 tie estis malaltaj alkalaj kampoj, sur kiuj furiozis akridoj pro trosekeco kaj kvakis ranoj pro inundeco; en ordinaraĵoj sezonoj monotonis blanka alkalo. Tiu katastrofa tendenco minacis ankaŭ aliajn lokojn de Ĉinio.

Septembre de 1995, estis ekkonstruata la modela ekologia agrikulturo en Yucheng. Antaŭ ĉio oni faris la antaŭe malglatan alkalan agron teraskampoj iom pli altaj ol la ĉirkaŭa tero, facile irigacieblaj kaj senalkalaj. Sur la teraskampoj estas fositaj multe da fiŝujoj, en kiuj oni bredas fiŝojn, keloniojn kaj anasojn. Tie funkcias ankaŭ pli ol 200 kokobredejoj, porkejoj kaj kultivejoj de fungoj. Sub tiuj konstruaĵoj estas cementaj metan-basenoj grandaj kaj malgrandaj. Oni portas en ilin herbojn, tigojn, branĉojn, foliojn kaj fekaĵojn homan kaj brutan, por ke tiuj estu hermetike fermentintaj je la temperaturo de 30-55°C. Post kelkatempo estiĝos metano, karbona dioksido. Tiu malmultekosta energio kondukiga laŭ tuboj al la kuirrejoj kaj loĝdomoj. Per ĝi oni povas lumigi lampojn, prepari manĝaĵojn, hejti ĉambrojn, kaj plie la metana likvaĵo povas esti uzata kiel organika sterko kaj skorio — por kulturigi fungojn. Post tio, per la uzita skorio

oni povas reprodukti lumbrikojn, kiujn manĝas kokoj kaj testudoj... La metana likvaĵo kaj skorio povas servi kiel sterko por kampoj. Tiel la fiinsektoj kaj malsanoj de terkulturaĵoj evidente malpliigas kaj la insekticidoj povas esti uzataj en minimuma kvanto. La grenoj, legomoj kaj fruktoj tiamaniere produktitaj estas rigardataj kiel verdaj manĝaĵoj en la merkato. En porkobredejoj ne vidiĝas fekaĵo kaj necesejo ne malbonodoras. Dank' al tio, multe pliboniĝis la higiena stato de la kamparo.

Sekve de ekspluato de la kampo en Yucheng per ekologia agrikulturo la hektara produktovaloro kreskis de malpli ol mil juanoj al 30 000 juanoj en 1996.

Nun tiuj kampoj jam ligiĝas kun la vinbera koridoro, artefarita lago, florigardeno, fiŝhokejo kaj amuzejo ĉe la ŝoseo. Tie regas plena prospero. Ni esperas, ke post nelonge tia fenomeno aperos ankaŭ en aliaj lokoj de Ĉinio. ■



Artefarita lago sur alkala tero

KURANTAJ AFEROJ

- En 1996 la grena produktokvanto de Ĉinio atingis 480 miliardojn da kg, per tio ĝi kreis novan rekordon. Tiujare multe kreskis ankaŭ la produktokvanto de viando, akvaj produktaĵoj, kortobirdoj, ovoj, lakto, legomoj kaj fruktoj.

- Ĝis la fino de 1996 Ĉinio entute arbarizis 20 milionojn da hektaroj en regionoj norda, nordorienta, nordokcidenta kaj ĉemara por formi kampŝirman arbaran zonan. Tio iagrade plibonigis la naturan medion de Ĉinio.

- En la 80-aj jaroj Ĉinio komencis produkti agrikulturajn veturilojn. Nun vendiĝis ĉiujare 2.4 milionoj da tiaj veturiloj. En la lastaj 10 jaroj la vendokvanto 100-obliĝis. Tiaj veturiloj eksportiĝis ankaŭ al Sudorienta Azio kaj Afriko. Ĉinaj kaj alilandaj entreprenistoj kune investis en Afriko por konstrui fabrikan, kiu produktos ĉiujare 50 mil tiajn veturilojn.


- En la pasintaj dekelkaj jaroj rapide disvolviĝis la bila merkato de Ĉinio. Nun en Ĉinio estas 434 tiaj kompanioj kun 17 milionoj da investantoj. La totala bilvaloro atingis 716.8 miliardojn da juanoj.

- Ekfunkciis la Unua Ozona Observejo kune investita de la Altebenaĵa Atmosferologia Instituto de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj Norvegio. Ĝi estas destinita ĉefe por observi intensecon de la ultraviolaj radioj sur la altebenaĵo, ŝanĝigon de ozono sur la loko kaj ĝian influon al la altebenaĵa medio. Ĝia funkcio estas utila al la studo pri la altebenaĵaj atmosfero, ekologia medio kaj ilia ŝanĝigo, protekto de la ekologia medio sur altebenaĵo.

- Novembre de 1996 "Hanglŭ N-ro 1", la unua granda turisma submarŝipo de Ĉinio, estis lanĉita. Ĝi kun 40 sidlokoj kaj 125 tunoj da



Tritika rikolto en la Delto de la Flava Rivero



Kampoŝirma forsto ĉe dezerto en norda Ĉinio

dismeto povas subakviĝi je 3.8 m.

Krome, Ĉinio faris ankaŭ 5 projektojn de turisma submarŝipo. La plej granda el ili havas 48 sidlokojn kaj povas subakviĝi je 50 m.



de HU YANHONG

Amantoj

**Kia ĝojo!**

Ĉu urbanoj ĉu kamparanoj en Ĉinio plejparte uzas biciklon, kiu estis unu el la gravaj objektoj de familio. Havigi al si aŭton estis neimageble por ordinaraj ĉinoj. En la lastaj jaroj iuj privataj entreprenistoj, komercistoj, artistoj kaj oficistoj de entreprenoj administrataj de aliaj landoj riĉiĝis kaj aĉetis vilaon kaj personaŭton kontraŭ granda monsumo.

Nun pli kaj pli multaj junuloj lernas stiradon de aŭto, ĉar unuflanke ili amas aŭton kaj aliflanke tio ebligas al ili trovi idealan profesion. Kompreneble, la biciklantoj ne malmultiĝis, ĉar la nombro de posedantoj de personaŭtoj estas malgranda en Ĉinio. La amantoj de ĵipo, kiujn la aŭtoro mencias ĉi-sube, estas grupo el la malplimulto.

Suno

MI ekkonis ĵipon, kiam mi konis grupon da amantoj de ĵipo.

Ĉi tie mi aludas pekinan ĵipon, produktitan de Ĉinio kaj destini-

tan por veturi sur ĉiaj vojoj. “Ĵipo” origine aludis malgrandan beston vigle saltantan en karikaturna filmo. Tiasence, oni produktis ĵipon, kiu povas veturi trans

montojn kaj ravinojn. En la Dua Mondmilito ĝi atingis preskaŭ ĉiujn bataletojn kaj poste furoris en la mondo. Meze de la 60-aj jaroj Ĉinio mem elfaris ĵi-

de ĵipo

pon. Tiam ĵipo kun verda karoserio servis ĉefe al armeo kiel kamufлита ekipaĵo.

En 1984 la Pekina Limigita Korporacio de Ĵipo kaj iu usona aŭtokorporacio kune disvolvis novan tipon de ĵipo, kiu estas pli eleganta kaj kolorriĉa ol la malnova. Ĝi estas aĉetebla kontraŭ 60 000 juanoj (7 000 usonaj dolaroj) kaj ŝatata en la aŭto-merkato de Pekino.

Kiam mi, kiel raportistino, proksimiĝis al la Pekina Klubo de Ĵipo-amantoj, mia kono pri ĵipo estis supraĵa, ke ĝi servas nur kiel trafikilo. Sed kiam mi amikiĝis kun kelkaj amantoj de ĵipo, mi trovis la klubon tereno plena de entuziasmo.

Li Hu, privata artisto, ekamis aŭton en la infaneco. En 1992 li aĉetis blankan pekinan ĵipon. De tiam li, fraŭlo, estas ĉiam kune kun ĝi, kvazaŭ li ricevus novelzonon. Pro sia artista profesio li ofte vojaĝis tien kaj tien kaj mem veturigis sian ĵipon al eksterejo, kaj ankaŭ lia ĵipo estis ofte uzata kiel rekvizito. Li Hu diris, ke en lia vivo filmo estas kariero kaj ĵipo — kunulo.

Kiam Zhang Jianyu (Ĝang Ĝjanju), juna reklamisto, volis aĉeti aŭton antaŭ kelkaj jaroj, li estis sorĉita de pekina ĵipo inter abundo da luksaj aŭtoj produktitaj de diversaj landoj. "Pekina ĵipo tre kongruas kun la animstato de nuntempaj junuloj, ĉar ĝi estas senĝena, fortika kaj energiplena. Mi aĉetis ĝin por havi ian animstaton. Kun forta kreivo ĝi donas al vi malsaman animstaton en malsamaj medio, atmosfero, se-

zono kaj homgrupo. Kia ajn viro, kondukante ĝin, povas sperti senĝenecon, kaj kia ajn virino, kondukante ĝin, havas apartan senton."

La vortoj de Zhang Jianyu larĝigis mian vidkampon. Ho, ĵipo havas tian ĉarmon. Ĝi jam transpasis mian konon, ke ĝi estas simpla veturilo. La amantoj de ĵipo trovis en ĝi ian komunan animsenton.

Zhou Yibing (Ĝou Ĵibing), komercisto, ŝatas ĵipon, ĉar ĝi povas esti sentegmenta. Tamen li opiniis, ke la tegmento de ĵipo el dika tolo estas malfacile uzebla. Kaj lin kaptis la ideo projekti aŭtomatan tegmenton. Li, kiu iam lernis homan sciencon en lernejo, decidis studi mekanismon. Kune kun aliaj li faris sennombrajn provojn kaj fine elfaris aŭtomatan tegmenton, starigeblan en nur kelkaj sekundoj kaj akiris patenton de la ŝtato. Poste li fondis ĵip-tegmentan fabrikan. Tiel, pekina ĵipo estas por li ne sole distraĵo, sed ankaŭ nedisigebla parto de lia kariero.

Ĝuste grupo da tiaj homoj organizis la Pekinan Klubon de Ĵipo-amantoj, kiu estas libera popola organizo sen leĝa persono kaj statuto. Ĝiaj membroj havas nenian profitan rilaton kun ĝi. Inter ili mi ne vidis diferencon de profesioj, sed nur ilian komunan amon al pekina ĵipo.

Ĉar mi konatiĝis kun grupo da amantoj de ĵipo, mi ĉiam pli proksimiĝis al ĵipo. En la fino de aŭgusto 1996 la Pekina Limigita Korporacio de Ĵipo lanĉis vojaĝon al Tibeto per pekinaj ĵipoj por fari

merkatan enketon kaj provi tiujn novajn ĵipojn. Karavano el 23 emociitaj membroj veturigis 10 ĵipojn nordokcidenten al la mistera Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Mi estis feliĉa sperti la vojaĝon kiel raportistino de la karavano.

La Qinghai-Tibeta Ŝoseo, konata kiel "ĉiela vojo", estas la plej alta super la marnivelo en la mondo kaj troviĝas plejparte sur frostiĝinta grundo. En aŭgusto kaj septembro, kiam la temperaturo altiĝas, la ŝoseo fariĝas kota. Se unu aŭto enkotigas, la aliaj ne povas trapasi. Kaj tiam ĉiuj devas tie viciatendi unu tagon, iam eĉ kelkajn tagojn. Ankaŭ nia karavano trafis en blokadon, kiam ĝi proksimiĝis al la pasejo de Tanggulamontaro, la plej alta loko de la "ĉiela vojo". Kion fari? Jen bona ŝanco por la ĵipoj plene montrian kapablecon. La 10 ĵipoj, forlasinte la atendvicon, grimpis montdeklivon, malsupreniris alian deklivon kaj transkuris ravinion. Veturante pli kaj pli foren, ni sentis fieron pro la ĵipoj.

La 14-an de septembro nia karavano, post duonmonata peniga vojaĝo, atingis la ĉefstabejon sur Ĉomolangma, la plej alta montpinto en la mondo.

Reveninte de Tibeto, mi pli profunde konas ĵipon kaj ĝiajn amantojn. Mi opinias, ke pekina ĵipo ne plu estas simpla maŝino, ĝi per si mem konkeris siajn amantojn, kaj la lastaj siavice dotis ĝin per pli da kultura enhavo.

Poste mi ĉiam sentis ian ekscitiĝon, kiam mi vidis ĵipon fulme veturanta preter mi. Mi rimarkis, ke ankaŭ mi, junulino, iom post iom ekamis ĵipon. ■

EL ĈINAJ GAZETOJ

LA NOVA BIBLIOTEKO DE LA ĈINA MODERNA LITERATURO EN KONSTRUADO

Iniciatite de la fama ĉina literaturisto kaj esperantisto Bakin, inaŭguriĝis la Biblioteko de la Ĉina Moderna Literaturo en Pekino en 1985. Nun ĝi posedas 266 000 konservaĵojn de ĉinaj verkistoj, el kiuj estas 152 000 literaturaj libroj, 2 200 malsamaj literaturaj periodaĵoj, 14 800 manuskriptoj kaj leteroj, 6 800 fotografaĵoj, 990 kasedoj kaj videobendoj. En ĝi funkcias ankaŭ 33 tenejoj provizitaj per verkoj, libroj, historiaj objektoj kaj vivbezonaĵoj de Bakin, Bingxin, Dingling kaj aliaj 30 famaj ĉinaj verkistoj. En la biblioteko kolektiĝas ankaŭ verkoj de Hongkong-anoj, Taiwan-anoj kaj transmaraj ĉinoj.

Tamen, kun kreskado de konservaj-kvanto la biblioteko ne povas kontentigi la bezonon. Laŭ peto de ĉinaj verkistoj, la ĉina registaro asignis grandan monsumon en 1996 por konstrui la Novan Bibliotekon de la Ĉina Moderna Literaturo kun areo de 30 000 kvadrataj metroj. Novembre de 1996 komenciĝis la konstruado de la ĝardeneska biblioteko. Laŭplane, la unuaperioda konstruado estos finita ĉe la fino de 1998.

TANGSHAN-A OMBRO-TEATRO

Ombro-teatro apartenas al la pupteatra arto, en kiu la sceno prezentas sur travidebla ekrano nur ombrojn de aktoroj aŭ de altranĉitaj siluetoj kaj sinkronigas la ombrojn kaj sonojn laŭ movoj de figuroj.

La Tangshan-a ombro-teatro de Hebei-provinco havas historion de almenaŭ 400 jaroj kun temo pri historio, fablo, mito, romano, komplika kazo k.a. En la lastaj jaroj estis reguligitaj 130 tradiciaj ombro-teatroj kaj centoj da fragmentoj de tiuspecaj teatroj. Kvankam multfoje prezentitaj, ili estas ankoraŭ tre ŝatataj.


La siluetoj de la Tangshan-a ombro-teatro estas faritaj el bonkvalita azena ledo. La homfiguro havas blankan aĵuran vizaĝon, rektan nazon kaj arkajn okulojn. Kiel metiartaĵoj, ili estas ŝatataj ne nur de spektantoj, sed eĉ de kolektantoj ĉinaj, japanaj, usonaj, germanaj kaj italaj.

Tangshan-aj ombro-teatroj estis prezentataj ankaŭ en la pupteatraj festivaloj okazintaj en Francio, Monako kaj Aŭstrio.

ĈINAJ TERMOFONTOJ

Ĝenerale dirite, subakva fonto, kies temperaturo superas 20°C, portas la nomon termofonto. Nun Ĉinio havas pli ol 1 900 termofontojn.

Yunnan-provinco famas pro siaj termofontoj en la vulkana regiono de Tengchong. Tie dissemiĝas pli



Prezentado de ombro-teatro

ol 50 termofontoj sulfuraj kun temperaturo de almenaŭ 50°C. Inter ili iu havas temperaturon de 105°C kaj el ĝi ŝprucinta akvo-kolono altas je dekoj da metroj.

La provincoj Guangdong, Fujian (Fuĝjan) kaj Taiwan riĉas je termofontoj, kies temperaturo plejparte superas 40°C. En Pingdong, Taiwan, elŝprucas fontakvo kun temperaturo de 140°C. Ĝi estas konata kiel la plej varma fonto de Ĉinio.

Ankaŭ en Liaodong-duoninsulo kaj Changbaimontaro, nordorienta Ĉinio, troviĝas multaj termofontoj. Proksime de la Ĉiela Lago en la nomita montaro fluas rivero. En spaco de duonkilometro flanke de ĝi kuŝas 32 termofontoj kun temperaturo de 55-76°C.

Multaj termofontoj sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo troviĝas en lokoj altaj je 4 000-5 000 m super la marnivelo, kaj formiĝas mirakla vidaĵo: malproksime imponas neĝkovritaj montoj kaj proksime nebule vaporas termofontoj. Yangbajan-termofonto, kun temperaturo de pli ol 100°C kaj akvo-kolonoj altaj je pli ol tri metroj portas la nomon Bolanta Termofonto.

Termofonto estas natura riĉaĵo kun bela perspektivo de sinteza utiligo. Termofonto donas grandan kvanton da varmo sen polucio de la medio. Ĝi utiligeblas por produkti elektron, forci legomojn, bredi fiŝojn... Nun en Yangbajan funkcias termoelektrejo. Krome, termofonto havas ankaŭ ian kuracefikon. Ĝuste pro tio, en Ĉinio funkcias multaj famaj termobanejoj, kiaj Conghua-termofonto en Guangdong, Huaqingchi-termofonto en Shaanxi (Ŝenŝji) kaj Xiaotangshan-termofonto en Pekino.

ANTIKA VILAĜO

En la vilaĝo Liukeng, Jiangxi(Ĝjangŝji)-provinco, estas pli-ol-1000-jaraj loĝdomoj kaj historiaj objektoj.

La vilaĝo, konstruita inter 907-960, estas ĉirkaŭita de montoj kaj riveroj. Ĉe bordoparto longa je kvin km pompas antikvaj arboj. En la vilaĝo vivas 820 familioj, ĉiu kun la sama familinomo Dong.



Kapela ruino en Liukeng-vilaĝo

Historia libro notas, ke en Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911) 44 vilaĝanoj ricevis la honoran titolon *ĝinŝi-o*, sukcesinte en kortega ekzameno sub ĉeesto de imperiestro, pli ol 200 vilaĝanoj — la titolon *ĝjuĝen-o*, sukcesinte en provinca ekzameno, kaj ĉ. 200 vilaĝanoj laboris kiel ŝtatoficistoj. Kelkaj vilaĝanoj bone scias etikon, ekonomikon, literaturon, kalendarion, *uŝu-on* k.a.

La vilaĝo havas 309 konstruaĵojn de Ming- kaj Qing-dinastioj, el kiuj estas proks. 100 temploj kaj dekoj da lego-salonoj. La pord-tabuloj kaj kolonoj plejparte estas ornamitaj per belskribo de antikvaj literaturistoj kaj kaligrafoj, i.a., 430 kaligrafajoj estas konsiderataj kiel plej belaj.

Informiĝinte pri tio, multaj fakuloj kaj turistoj venis en la vilaĝon. Fakuloj konstatis post la esploro, ke la riĉa kulturo, distingiĝaj loĝdomoj kaj raraj antikvaĵoj de la vilaĝo estas valoregaj por studo kaj kultura kaj historia.

TRIBUTO-VINO ELTERIGITA

En la lasta decembro estis elterigitaj kvar vinuoj kun sorgobrande en Jinzhou (Ĝingŝoŭ), Liaoning-provinco. Koncernaj fakuloj konstatis, ke la vinuoj estis enterigitaj en 1845. En la vinuoj estas kvar tunoj da sorgobrande kiel tributo por la Imperiestra Palaco siatempe. Ili estas rigardataj kiel historia restaĵo malofte videbla en la mondo.

La elterigita sorgobrande, flaveta kaj aroma, plezurigas trinkanton. Ĝi havas gravan signifon por studi la vinan kulturon de Ĉinio. Fakuloj proponis, ke la vinuoj estu konservataj kaj la sorgobrande aŭkciata aŭ vendata en la enlanda kaj internacia merkatoj.

BAMBUORIĈA JUNSHAN-MONTO

Junshan(Ĝjunŝan)-monto, oriente de Dongting-lago en Hunan-provinco, areo unu kvadratan kilometron.

Sur la monto kreskas 22 specoj da bambuoj kun filostakio (*Phyllostachus viridis*) kiel la ĉefa. Dum evoluo iuj el ili aliformiĝis je branĉoj kaj eĉ je trunkoj. Umeflora bambuo havas trunkon en formo de kvin petaloj, kies sekco similas al umefloro. Ĉimonobambuso (*Chimonobambusa quadrangularis*), ĉ. 10 m alta, havas trunkon kun eĝoj de la bazo ĝis la supro. Ovoforma bambuo havas trunkon en formo de anas-ovo de la bazo ĝis la supro. Alia filostakio (*Phyllostachus heterocycla*), ĉ. sep m alta, havas trunkon kun dika bazo kaj tre maldika supro. Ĝi, kun sinsekvo da internodaĵoj supren kurbigantaj, aspektas kiel fluganta drako. *Laba*-bambuo havas trunkon en formo de klariono. Kaj iu bambuo kun duobla trunko aspektas kiel du ludantaj ambirdoj.



KULTO AL LA BAMBUO

de YI XIU

ĜENERALA kulto al bambuoj vidiĝas en la lokoj de la etnoj ji-a, mjaŭ-a, lisu-a kaj taj-a en sudokcidenta Ĉinio. La kaŭzo estas simpla, ĉar ili vivas en bambuaro.

Tia kulto naskiĝis en la primitiva socio, en formo de totemo. Tiam la produktaj fortoj kaj homa kapablo estis tre malgrandaj. Oni miris antaŭ la forta vivipovo de la bambuoj, opiniante, ke tion kaŭzis iu mistera forto. Sekve ili kredis kaj kultis bambuojn por ke ili per sia mistera forto gardu la homojn en subigo de la naturo. Kun la ĉiam plifortiganta deziro pri plimultigo de sia loĝantaro, la homoj adoris la bambuojn kaj enviis iliajn fortan vivipovon kaj rapidan reproduktadon kaj teksis multajn mitojn, kiuj rakontas, ke la prapatroj de la homoj devenis de bambuoj, kaj ili estis savitaj de bambuoj. Dank' al tiuj mitoj bambuoj fariĝis totemo de iuj homaj grupoj kun mistera forto kaj "sangrilato" al la homoj. Antaŭ la totemo oni adorklinis sin kaj kreis diversajn ritojn, por ke la bambuoj benu per prospero la etnoj kaj forbenu al ili malsanojn kaj ka-

tastrofojn.

Naskiĝo de la totemo, ĝenerale dirite, asociis sin kun legendoj, kiuj konsistas el "kulto pro origino de la prapatroj" kaj "kulto pro danko".

Laŭ la unua kulto oni opinias, ke la homoj originis el bambuo, kiu havas "sangrilaton" kun ilia klano. Legendo de ji-oj montras, ke en la prahistorio iu bambua tubo sur rivero alfloris al bordo. Ĝi krevis kaj el ĝi eliris knabo, nomata Acha. Li edziĝis al virino, kiu poste naskis filon. Liaj idaroj ja estas la nunaj ji-oj. Cirkulas multaj similaj mitoj. Ekz. mito de lisu-oj diras, ke ilia prapatro devenis de bambua kaverno kaj estis honorita kiel "reĝo de bambuoj". Legendo de taj-oj diras, ke la dio kreis la mondon kaj vivon el bambuoj. Ankaŭ tio pruvis la "sangrilaton" inter la homoj kaj bambuoj.

La dua kulto montras, ke la homaj prapatroj estis savitaj de bambuoj, kaj ilia klano havas apartan rilaton kun la lastaj. Sekve ili prenas bambuojn kiel sian totemon por danki ilian favoron. Legendo diras, ke en inundo gefratoj, sidantaj sur

ŝranko, floris al montosupro kun sovaĝa bambusaro kaj aceroj. Sin apogante sur bambusaro kaj aceroj ili grimpis sur la montpinton kaj tie ekloĝis. Ili ĵuris antaŭ la bambusaro kaj aceroj: "Multan dankon pro via savo. Ni kultos vin kiel dion generacio post generacio."

Kulto al bambuoj de la nacionalplimulto en sudokcidenta Ĉinio estas tre enhavoriĉa. Tio speguliĝas en nuptoj kaj funebro, adoradoj, familiaj nomoj, vestoj kaj ornamadoj, tabuoj k.a.

Laŭ la moro en naskado kulto al bambuoj jam fariĝis tre populara en la vivo. Ekz. en ji-etno estas kutimo: Antaŭ akuŝo de sia edzino, la edzo devas dehaki ĉ. 70 cm altan bambutubon. Post naskiĝo de la bebo oni enmetas la postnaskaĵon en bambutubon kaj pendigas ĝin sur bambuaro, por montri, ke la bebo estas posteulo de bambuo, kaj petas benon de la bambua prapatro. En plejparto de la loĝlokoj de buji-oj estas moro: Ĉe la unua gravediĝo de virino, oni okazigas ceremonion, por ke ŝi sekure akuŝu. Tiam frato de la akuŝontino devas elekti du egallongajn kaj egalnodajn bambuojn kaj komisii du virojn

porti ilin al la hejmo de la fratino por esprimi bondezirojn. Prezidanto de la ceremonio kurbigas la bambuojn en arkajon kaj ornamas ĝin per ruĝaj paperaj homfiguroj kaj ruĝaj kaj verdaj paperaj floroj, kiuj simbolas idojn senditajn de la frato de la akuŝantino. La prezidanto krias: “Dankon al bambuo pro la donacota filo”, “Benon al ni”. Fine li metas la bambuojn ĉe la dormoĉambro aŭ ĉe la liton de la akuŝantino, kredante, ke ŝi sekure naskos.

Inter la geedziĝaj moroj tiu de “bambu-plantado” estas tre interesa. Ĉe edziniĝo de knabino, ŝia gepatra familio devas donaci al la novedzo paron da kompletaj bambuidoj kun folioj kaj radikoj, kiujn aparta komisiito atente portas al la familio de la novedzo. La novedzo plantas la

bambuidojn antaŭ aŭ post sia domo kun espero, ke la bambuo portos al ili feliĉon, prosperon kaj benos iliajn infanojn.

La nacimalplimultanoj kultantaj bambuojn, kiaj ji-oj, mjaŭ-oj kaj lahu-oj, opinias, ke ili devenis de bambuoj, post la morto ilia animo revenos al la bambua prapatro kaj denove transformiĝos en bambuon. Ili kultas la bambuan prapatron kaj entombigas bambuon, sekve la bambuo fariĝis portanto por kontaktigi animon de la mortinto kaj la bambuan prapatron. La diverslokaĵoj mjaŭ-oj kultas bambuojn en diversaj manieroj. Ili prenas bambupecon, bambutubon aŭ bambusakon kiel sian bambuan prapatron kaj kultas tiujn. En ĉiuj familioj de lahu-oj estas longpieda tablo el bambuaj slipoj, sur kiu estas paroj da bam-

buaj kandelingoj, al kiuj gluiĝas blankaj paperflagoj kun du malgrandaj bambutuboj en la fronto. Jen simbolo de la loĝejo de la hejma dio. En festoj kaj antaŭ gravaj aktivadoj oni faras kultadon antaŭ ĝi.

Ĉiujare ji-oj okazigas specialan danc-feston por kulti bambuojn. Tiam ĉiuj vilaĝoj devas elekti kaj planti bambuon por kulti, kio simbolas prosperon de la vilaĝo. Oni starigas altaron antaŭ la bambuaro. Unue prezidanto de la kultado prezentas antaŭ la altaro kultajn, legas kultan tekston kaj preĝas al la prapatro — bambuo, por ke ĝi benu la posteulojn per prospero, riĉa rikolto, sana kresko de iliaj idoj kaj forbenu al ili ĉian malsanon kaj malfeliĉon. Poste ĉiuj vilaĝanoj dancas ĉirkaŭ la bambuaro. ■

Anoncoj varbataj

“El Popola Ĉinio” naskiĝis en 1950. Depost la naskiĝo ĝi konigas Ĉinion kaj la ĉinan kaj alilandan E-movadojn kaj per tio akcelas la interkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj diverslandaj esperantistoj. Ĝi distribuiĝas al 157 landoj kaj regionoj kaj servas kiel ligilo de amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Por bone disvolvi la rolon de Esperanto en la kampoj ekonomia, scienca kaj kultura la redakcio fondis Reklaman Fakon en 1995.

Ni kore invitas vin varbi ekstermovadajn anoncojn kaj fari viajn anoncojn en EPC. Varbintoj de ekstermovadaj anoncoj

ricevas 20%-an makleraĵon. Detalaj informoj haveblas ĉe: **Redakcio de El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio.**

Telefono: + 86-10-68321808

Fakso: + 86-10-68321808

TARIFO

	USD
Dorskovrilpaĝo	2 000
Reverso de dorskovrilpaĝo	1 500
Interna paĝo (kolora)	1 000
Interna paĝo (nigra-blanka)	500

*50%-prezo por duonpaĝo. Por movadaj anoncoj validas duona prezo.

CHI ZIJIAN:

SUNSUBIRO ĈE BOVLOBAKUJO

(Novelo)



Jen harmonie kvieta kaj iom melankolia bildo kun koloro de nordorienta kamparo de Ĉinio. Kvankam en la vivo ekzistas nemalmultaj mankoj kaj nekontentigaĵoj, tamen ĝi plenas de simpatio kaj zorgo.

LA rilatoj inter Guan Xiaoming (Gūan Ŝjaŭming) kaj lia favorata nigra hundo Bing Liur dronis en stagno. Jam tri tagojn senbrue Bing Liur forestis frumatene kaj revenis en profunda nokto por gardi la hejmon de la mastro. Tian staton kaŭzis la cirka prezentado en somero. Unu el la programeroj estis: Dekjara knabo kun stako da bovloj sur la kapo sursceniĝis sekvata de bela flava hundo. Paŝante, la knabo ĵetis unu post alia la bovlojn de sur la kapo al la hundo, ĝi perbuŝe prenis tiujn bovlojn kaj donis ilin al bela knabino, poste ŝi ĵetis unu post alia la bovlojn al la knabo, kaj la lasta perkape ilin prenis tre bone... Guan Xiaoming gape spektis la prezentadon. Guste tiam komenciĝis fatalaĵo de Bing Liur.

Tiuvespere, reveninte hejmen Guan Xiaoming kondukis Bing Liur ekster la korton, brakumis ĝin

je la kapo: “Ni kunlaboru, por ke mi fariĝu cirka aktoro la plej bona kaj vi hundo la plej eminenta!”

Senlace Guan Xiaoming sin trejnadis pri perkapa subportado de bovloj. Je la komenco li metis sur la kapon la bovlojn kun likoj kaj ire-reire paŝis en la korto. Ofte la bovloj facile falis sur la teron kaj disrompiĝis. Foruzinte la nekompletajn bovlojn, Guan Xiaoming ŝtele sin trejnis per kompletaj bovloj. Pli kaj pli malmultiĝis bovloj en la bovloŝranko, dume pli kaj pli multiĝis pecetoj de la rompitaĵo. Najbaroj opiniis, ke la cirka prezentado postlasis manion al Guan Xiaoming. Ankaŭ Bing Liur multe suferis. Ĝi elĉerpiĝis, tamen ne sukcesis kapti eĉ unu bovlon ĵetitan de la mastro. Tiun tagon, Guan Xiaoming estis ŝtele metanta novan bovlon sur la kapon, kiam revenis la patro veturiganta la bovoĉaron kun pajlo. “Kiel aŭdaca vi estas!” la patro

riproĉis. Xiaoming skuigis de timo, ke la bovlo falis teren kaj disrompiĝis. La hundo haste kuŝigis sur pecetoj por ilin kovri. Sed Xiaoming finfine ne povis eviti baton. Aŭdinte bruon, la avo eldomiĝis kaj riproĉis sian filon: "Li nur rompis unu bovlon kaj vi perdis la paciencon. Infanece vi eĉ rompis du grandajn akvovazojn!"

Post tiam la avo, kiu estis en la hejmo dum jaroj, vizitadis denove la malnovan bakujon. Li firmigis sian decidon baki argilajn bovlojn por la nepo. Junece la avo estis lerta en bakado de brikoj. Ĉar briko estis elbakebla, certe elbakeblas ankaŭ bovlo. Kaj bakujo da bovloj sufiĉos por trejnado de la nepo por unu aŭ du jaroj.

La ĉinlingva instruisto Wang petis Guan Xiaoming parkere skribi sur la nigra tabulo novajn ĉinajn ideogramojn. Xiaoming faris eraron en ordo de strekoj. Instruisto Wang diris: "De tiam, kiam vi spektis la cirkan prezentadon, malprogresis via lernado. Oni diris, ke ankaŭ viaj hundo kaj avo suferis." Ekridegis la lernantoj. Xiaoming koleriĝis — kiel oni povas egaligi lian avon kun la hundo! Li eĉ volis insulti la instruiston, tamen apenaŭ li tion faris, li forlasis la klasĉambron.

"Avĉjo, ĉu mi povas posedi la arton perkape subporti bovlon?" demandis Xiaoming. "Ne gravas, ke vi sukcesos aŭ ne," la avo diris. "Ĉu vi vere povas elbaki argilan bovlon? Oni diris, ke tio estas briko-bakujo, sed ne bovlobakujo." "Mi igos ĝin bovlobakujo," la avo diris definitive.

Guan Xiaoming trejnigis Bing Liur por kapti bovlojn. Unu ĵetita bovlo neatendite trafis la dekstran okulon de la hundo. Brakumante la hundon, Xiaoming malgaje ploris. Nokte en ĉiu dua duonhoru li iris al la hundejo por flegi la vunditan beston. La familio tiel maldormis tutan nokton.

Orruĝa sunlumo radiis al la farejo de argilaj bovloj. La avo kun nudaj piedoj kaj alte falditaj krurumoj faris 68 argilajn bovlojn en unu spiro. En vesperruĝo li kontente rigardis la faraĵojn pensante sekigi ilin antaŭ neĝado kaj poste baki ilin... De malproksime iom post iom alproksimiĝis silueto laŭ la montodeklivo. Montriĝis gravedulino, edzino de la ĉinlingva instruisto de Guan Xiaoming. Iom malsana je menso, ŝi kelkfoje gravediĝis, tamen ĉiufoje abortis, ĉar ĉiam en krizo de la malsano ŝi freneze kuris ekstere: Foje ĉe puto ŝi glitfalis sur glacieron, aliffoje sur marĉa herbejo ŝi estis piedfrapita de bovo... Jen ŝi, ornamita per ruĝa gaza tuko ĉe la kolo, estis baldaŭ akuŝonta, ŝia vizaĝo disradiis ĝojon. Plejofte ŝi kondukis kiel sanaj homoj. "Onklo Guan, mi petas de vi bovlon," ŝi dolĉe diris. "Mi naskos bebon, por kiu mi devas pretigi novan bovlon." La maljunulo sciis, ke tio estas bonaŭguro por facila nasko de bebo. "Miaj bovloj ankoraŭ ne estas prilaboritaj. Post bakado mi donacos unue al vi." Ŝi ĝojiĝis: "Ĉu via bovlo estas bela?" "Certe," la mal-

junulo respondis. "Vidu, ĝi ricevos tian koloron kiel tiu de la subironta suno."

Ĉe la fino de la aŭtuna rikolto Xiaoming kun Bing Liur promenadis. La hundo servile sekvis la mastron, perdante sian antaŭan arogantecon.

En la lastaj tagoj Xiaoming gustumis doloron unuafoje en sia vivo. Li pensis, ke eble prave diris la kunlernantoj: Devigi hundon agi kiel homoj nur kaŭzos perdon de ĝia avantaĝo inter hundoj. Plie, kiel hundo kun vundita okulo povas aperi en brila cirko? Li konfuziĝis de tiu demando. Sed la avo penadis en la bakujo jam tutan aŭtunon, li faris centojn da argilaj bovloj. Veninte al la bakujo, Xiaoming kun ĉagreno diris al la avo: "Mi ne plu min trejnos, eĉ se la bovloj estos elbakitaj." La avo ĵetis koleran rigardon al la nepo, kaj poste al la argilaj bovloj. Lia tono montris malgajon: "Vi ne bezonos la bovlojn, sed aliaj volas. Tiun vesperon la edzino de instruisto Wang venis peti bovlon por sia bebo." "Ankoraŭ ne naskiĝis la bebo. Kaj plie, ĉiufoje ŝi malsukcesis naski." Memorante tiun ĉinlingvan lecionon, Xiaoming ankoraŭ malĝojis. "Kial vi tion diris?" la avo malpacientiĝis. "Mi opinias, ke ĉi-foje la bebo venos en tiun ĉi mondon." Tiun tagon la patrino de Xiaoming faris multajn kukojn. Ŝi diris: "Mi volas donaci kelkajn kukojn al la edzino de instruisto Wang. Eble ŝi akuŝos tiun ĉi vintron. Fakte ŝi ne estas mensmalsana, nur mankas al ŝi helpo de virino. Se mi akompanas ŝin, certe ŝi naskos sanan bebon." De tiu tago la patrino de Xiaoming vizitis la hejmon de instruisto Wang ĉiutage.

Finfine ĉiuj argilaj bovloj estis metitaj en la bakujon. La avo havis sufiĉan fidon al bakado. Tiam, kiam li komencis tian laboron, la ĉirkaŭaĵo plenis de verdo, sed nun regis velkado. Kiam la avo hejtis la bakujon, brilis suno, kvazaŭ anoncanta brilan rezulton. Tiel kun bona humoro la avo faris ekbruligon.

Estis frumateno de la tago de elbakiĝo. Longatempe la maljunulo sidadis antaŭ la bakujo, rigardante vaporon iom post iom malaperantan en la aero. Li stariĝis, surmetis gantojn, malfermis la pordon de la bakujo. Bakujo da orruĝa koloro lumis antaŭ liaj okuloj, kio tre ĝojigis lin. Zorgeme li etendis manon por preni bovlon, tamen nur ĝian pecon orruĝan. Malespere li ĵetis ĝin kaj prenis refoje, denove pecon. "La bovloj estas fuŝbakitaj!" Malgaje pensante, li insiste etendis la manon en la bakujon, sed ĉiuj estis fuŝaĵoj. La ora ruĝo estis pli brila, pli kruela ol la subiranta suno. Li konsciis, ke vanas la penado dum la tuta aŭtuno.

Ree forkuris la edzino de instruisto Wang, kiu ĉi-foje tute ne kaŝis siajn larmojn: "Denove ni ricevos abortaĵon." Guan Xiaoming brakumis la kapon de Bing Liur: "Ni serĉu la edzinon de instruisto Wang. Mi ne scias, kien ŝi iris. Se vi scias, gvidu min." Bing Liur kapjesis kaj forkondukis Xiaoming

el la hejmo. Kiam ili atingis la ekstremon de la vilaĝo, okcidenten subiris la suno sangoruĝa. Bing Liur rigardis la sunon kaj iom poste tuj fulmorapide kuris en direkto al la bakujo. Guan Xiaoming spiregante postkuris la hundon, tamen ĝojis, ke ĝi retrovis sian viglan naturon. Atinginte la bakujon, Bing Liur bojadis kontraŭ ĝi. Guan Xiaoming tuj proksimiĝis kaj flaris sangan odoron. Ŝovinte sian kapon en barakon ĉe la bakujo, li vidis la edzinon de instruisto Wang kuŝanta sur seka pajlo kaj bebon moviĝanta en ŝiaj brakoj. "Guan Xiaoming," ŝi kriis. "Mi estas atendanta helpon. Bonvolu alvoki vian instruiston veturigi min kaj la bebon hejmen." "Kial vi venis ĉi tien akuŝi?" surprizite demandis Guan Xiaoming. "Mi serĉis bovlon por la bebo. Kiam mi finfine trovis kompletan bovlon, la bebo ne plu volis resti en mia ventro, kaj mi devis akuŝi ĉi tie." Ŝi buŝsignis al la dekstra flanko, kie sur seka pajlo sidis kompleta bovlo kun malhel-ruĝa koloro. La simetria bovlo kun randa rando kaj solida bazo estis tiel bela kvazaŭ bakita de la subiranta suno.

La novnaskito pezis je 4 kilogramoj. La vilaĝanoj surpriziĝis, ke ŝi sukcesis naski la bebon sen helpo kaj plie kunportis hejmen unu orruĝan bovlon. ■

Elĉinigita de XIANG HONG

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1997

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1700,00	1300,00	3000,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
TARIFO A: Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
TARIFO B: Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
TARIFO C: Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
Rim. Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.				

Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el "El Popola Ĉinio" kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimenon.

DAVID CURTIS (Britio):

Brito en suda Ĉinio

EN GUILIN

Estis mardo, la 13-a de aŭgusto 1996. Mi sidis en Hongkong-flughaveno. Kial? Ĉar mi estas UEA-delegito, kaj tial mi ricevis novaĵleteron "Esperanto en Azio". Antaŭ 20 monatoj mi legis en ĝi, ke ĉinoj bezonas vizitojn de eksterlandanoj por praktiki Esperanto-konversaciojn. Mi volis helpi ilin. Poste mi legis ke okazos en Ŝanhajo, de la 22-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1996, la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Tio decidigis min, kaj mi komencis korespondi kun ĉino, d-ro Liu Shaozhong (Liŭ Ŝaŭĝong), sekretario de la Guilin-a Esperanto-Asocio en sudokcidenta Ĉinio.

Nun mi atendis flugi al Guilin. Ĉirkaŭ mi babilis centoj da ĉinoj. Preter la homamaso mi povis vidi multajn anglalingvajn reklamojn kun malĝustaj lingvouzoj. La angla estas tro komplika por esti dependinda internacia lingvo, kaj mi esperis ke, kiam mi atingos Guilin, mi ne vidos nek aŭdos la anglan, mian gepatran lingvon. Mi esperis dependi tute de Esperanto, kvazaŭ mi estus denove en Prago, inter redaktoroj de "El Popola Ĉinio", antaŭ nur tri semajnoj, dum la 81-a Universala Kongreso.

La malo okazis. Mi estis nun en Guilin-flughaveno, kaj neniun renkontis min. Afabla junulino mendis taksion, informis ĝian ŝoforon, kiu veturigis min 18 kilometrojn al la gastejo apud la Pedagogia Universitato de Guilin. Estis varmege, kaj jam 10:30 vespere. Mankis al mi instrukcioj por klimatizi la ĉambron. Mi vidis sur tablo du objektojn tre similajn al pecoj de ĉokolado. Mi kredis ke estas ĉina kutimo tiel bonvenigi gastojn. Horojn poste, mi vekigis. La buŝo estis ege seka. Kion fari? Solvo estas dolĉigi la langon per ĉokolado. Mi ek-

manĝis pecon, sed tuj elkraĉis ĝin. Ĝi estas sapo!

Matenmanĝinte en la restoracio de la gastejo, mi ne sciis kion fari, ĉar neniu povis paroli Esperanton, krom miaj samideanoj, kiuj ne estis aperintaj. Kia ĝojo kiam fine d-ro Liu Shaozhong alvenis kune kun du samideanoj! Kiom varme ili bonvenigis min, kaj kiel klare evidentiĝis ke du el ili estis tiuj, kiuj volis renkonti min. Iu ĉe la flughaveno estis misinforminta ilin pri la elirejo de pasaĝeroj de mia aviadilo. Ili estis atendintaj longe, sed en malĝusta loko. Konvinkite ke mi decidis veni samtempe kiel d-ro Liu Shaozhong, la 14-an, ili estis reirintaj hejmen per aŭto mendita de membroj de la Esperanto-Asocio. Ili ja faris sian maksimumon por plaĉi al mi. Do, ĉio en ordo!

La 15-an kaj 16-an mi instruis lokajn e-istojn. Mia tria tago en Guilin estis unu el la plej bonaj en mia vivo. Liu, liaj familianoj kaj kvar geamikoj ekskursis kun mi per boato 29 kilometrojn suden de Guilin al Krona Kaverno. Tiu estas giganta serio da grotoj kun subtera rivero, 12 kilometrojn longa. Ni ne nur tramarŝis ĝin sed boate kaj trajne veturis, ĉirkaŭitaj de belege lumigataj rokoj, stalagmitoj kaj stalaktitoj. Ni estis subtere dum horoj, ĝuante elstarajn vidindaĵojn.

La sekvantan tagon mi havis gravan taskon: popularigi Esperanton inter cent ĉinoj en la nomo de la Guilin-a Esperanto-Asocio. Per taksio miaj amikoj transportis min al Palaco de Kulturo, kie dimanĉe kunvenas multaj grupoj. En ĉambrego longa standardo bonvenigis enirantojn per la vortoj: Sunday English Corner (Dimanĉa Angla Angulo — sandej ingliš kona). La aŭskultantaro sufiĉe bone konis la anglan kaj estis invitinta min prelegi pri la angla kulturo kaj Esperanto. Pri la unua temo mi mallonge informis miajn aŭskultantojn, dirante iom pri la brita movado por konservi histoririĉajn konstruaĵojn kaj belegajn kamparpartojn; sed pri Esperanto mi prelegis unu horon. Ne estis mikrofono, do mi devis laŭtege paroli. Alta, digna profesoro dufoje alportis al mi teon por malsekigi mian gorgon. Post mia prelego li dankis kaj gratulis min, opiniante ke mi persvadis almenaŭ 80 aŭskultantojn ke ili aliĝu al venonta Esperanto-kurso en septembro. Multaj homoj urĝe demandis pri aspektoj de la temo, kiujn mi ne povis kovri dum nur unu horo, do la afero daŭris dum plia duonhoro.

La 21-an ĉe Guilin-flughaveno mi adiaŭis, malĝoje, miajn karajn Esperanto-geamikojn kaj denove trovis min nekapabla komuniki kun iu, pro la lingvobaro.

EN ŜANHAJO

Sen miaj samideanoj mi estis tiom kapabla kiom nove naskita bebo, kaj baldaŭ mi falis en malfacilaĵon. Post tiu sperto de la efikeco de la tiel nomata internacia lingvo: la angla, estis granda senpeziĝo por mi, kiam fine mi forlasis Guilin kaj ekflugis al Ŝanhajo. Estis bela sunsubiro maldekstre, kaj fulmo



La aŭtoro (la dua de dekstre) kaj ĉina esperantisto

dekstre sed distance.

Mi alvenis la universitatan apartamenton menditan de mi ok monatojn antaŭe. Mi havis ĉambron kaj banejo-necesejon kun kvar aliaj viroj. Tri venis de Japanujo kaj la kvara de Bhavato: la tiel nomata Hinda Unio, laŭ UEA. Matene ni senpage estis transportataj en luksa aŭtobusego al la kongresejo. Kiel la sola brito, mi uzis mian minuton por persvadi ĉiujn, ke ili konvinku parlamentanojn kaj lingvoinstruistojn pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. Mi deziris al ĉiuj ĉion bonan en la nomo de Esperanto-Asocio de Britio.

Tagmanĝinte, mi reiris al la kongresejo por ĉeesti prelegon de profesoro doktoro Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA. Li lerte enkondukis la kongresan temon: Azio kaj la 21-a Jarcento. Lia argumento estis ke la forto de Azio kreskas pli rapide ol tiu de Eŭropo. Azio estos la fokuso de energio en la 21-a jarcento, sed pro la historio, Eŭropo kaj Usono ankoraŭ estas politike pli fortaj. UN ankoraŭ ne agnoskas ke ĝi havas lingvoproblemon, sed la Eŭropa Parlamento komencas konstati ke tia problemo ekzistas en Eŭropa Unio. La profesoro menciis ke 83 EP-anoj jam subtenas Esperanton, danke al kam-

panjo kunordigata de Germain Pirlot. Mi sentis min fiere, ĉar, kiel brita agento en tiu kampanjo, mi estis persvadinta 20 el tiuj 83, dum nur unu jaro, ke ili apogu la enkondukon de Esperanto en lernejojn, kiel helplingvo en la instruado de fremdaj lingvoj.


Posttagmeze de la 23-a mi ĉeestis la duan prelegon pri la kongresa temo. S-ro Yamasaki Seiko de Japanujo maltrankviligis min, ĉar li estis tre pesimisma pri la estonteco de Esperanto en komerco en Azio. Mi estis veturinta de Anglio ĝuste por kuraĝigi la uzon de Esperanto en komerco, sed li asertis ke la lingvo restu idealo senprofita, kaj ke ni atendu ke la angla restos la ĉefa internacia lingvo. Fininte sian prelegon li invitis demandojn, do mi tuj demandis kiel multe da homoj povus esti motivigataj por lerni Esperanton, se ili ne povus atendi uzi ĝin por perlabori monon. Li respondis ke ni devas apelacii al la idealismo de la junuloj. Flanke de li sidis profesoro d-ro Lee Chong-Yeong, kaj mi diris al s-ro Yamasaki ke la profesoro estis doninta al mi esperon, sed li donis al mi la malon. Li respondis ke tio estas la valoro de diskutado.

Tiun vesperon okazis la antaŭlasta evento de la kongreso: Arta Vespero en la hotelo "Silka Vojo". Parte amatora, parte duonprofesia, parte alte profesia, la enscenigo estis ĝojiga. Por mi, eŭropano, mi kredas, ke ĝi devus esti eĉ pli ĝuebla ol por azianoj, ĉar unuafoje mi vidis tiom da orientaĵoj, kiujn mi neniam estis vidinta aŭ aŭdinta. Ekzemple, la prezentantino, bela korea kongresanino, komencis la aferon majeste, alproksimiĝante malrapidege al mikrofono, akompanate de belsona orienta muziko. Ŝi, vestita per glora, bunta folkloro kostumo, digne prezentis diversajn programerojn, unu post alia. Estis dancgrupoj de belegaj junulinoj; esperantista familio kantanta "La Iamo Longe For"; profesia, belega sopranulino; ŝercemaj kongresanoj; duonprofesia kongresana tenorulo, kantanta laŭ moderna muziko; individuo, kiu ludis sola orientan fluton; paro da kongresanoj kiuj, vestitaj per nigraj roboj, malrapidege dancis gracie; skipo da geĵapanoj, kiuj prezentis tradician dancon, dum kiu ili ritme moviĝis de la scenejo, ĉirkaŭiris la spektantaron kaj reiris al la scenejo. Estis amuza dialogo inter tri kongresanoj pri preseraroj. Mi ne povas memori ĉion, kio okazis, ĉar mi tiom ĝuis ĉion, ke mi ne povis skribi notojn; sed mi certas ke mi neniam forgesos la Artan Vesperon de la Unua Azia Kongreso de Esperanto.

Matene de la lasta tago okazis la solena fermo. Tio estis esperiga evento, ĉar oni informis, ke fakte estas 580 kongresanoj. Ĉiuj konsentis, ke la Kongreso tre bone sukcesis, kaj, post resumo de ĉio okazinta, la kongresanoj kore aplaudis la Lokan Kongresan Komitaton. S-ro Takeuti Yosikazu, prezidanto de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, ceremonie anoncis la komisionan decidon pri la lando, en kiu okazos la Dua Azia Kongreso de Esperanto. Ĝi okazos en Vjetnamio en 1999. Tio estis bona decido,


ne nur ĉar la vjetnama delegito sidis flanke de mi ofte en la oficiala aŭtobuso kaj tiel iĝis amikino, sed ankaŭ ĉar ŝia lando estas egale atingebla de ĉiuj en Azio. La tradicia Esperanto-flago estis transdonata al ŝi, kaj baldaŭ poste la Unua Azia Kongreso de Esperanto oficiale fermiĝis.

Mia koro tamen estis malfermita al Ĉinio, de kiam mi alvenis al Guilin. Ĉiam mi estis traktata afable. Neniam iu ajn minacis aŭ ofendis min. Eĉ rabisto malsukcesis forpreni mian monujon. Li provis, en Guilin, malfermi mian sakon, dum mi estis enironta aŭtobuson. Mia Guilina amikino, kiam mi baldaŭ poste staris flanke de ŝi en la aŭtobuso, hontis pri tiu fiulo; sed, kiel mi diris al ŝi, oni atenditan aferon en ia urbego, kaj estis mia devo vigle prizorgi miajn posedaĵojn. Mi ne povas memori ian alian malagrablaĵon, sed certe mi ĉiam memoros, ke mi ricevis almenaŭ milon da afablaĵoj. Ne nur tiuj personoj jam menciitaj, sed ankaŭ multaj aliaj, certe dum la tiama kongreso, prezentis sin al mi kaj eĉ donacis al mi memoraĵojn. Mi havaŝ amason da adreskartoj kaj ne malmulte da trezoretoj. ■



Kutimo Karikaturado de YE CHUNYANG

Raraj animaloj



Acipenseroj estas raraj fiŝoj. Nun en la mondo vivas acipenseroj de pli ol 20 specioj, el kiuj 8 estas en Ĉinio.

La poŝtmarkoserio el kvar pecoj, montrantaj versimilajn acipenserojn, estis emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko en 1994.

Pandoj estas bestoj vivantaj en bambuaroj sur montoj. Mildaj kaj solecaj, ili manĝas ĉefe bambuajn foliojn. Ili estas trezoro de Ĉinio. Koaloj, mamuloj el la ordo de marsupiuloj, vivas sur arboj en la sudorienta parto de Aŭstralio. Ili, timemaj, solecaj kaj inertaj, manĝas arbofoliojn. Pandoj kaj koaloj estas famaj raraj bestoj, perentaj en la mondo.

La poŝtmarkoserio el du pecoj, montrantaj la supre menciitajn bestojn, estis kune emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Poŝta Kompanio de Aŭstralio en 1994.



En Rottneros-parko, Svedio
de **BOO MEE KIM-LINDBLOM**
(Svedio)



Vintro en Alaska
de **R. F. GONZALEZ (Usono)**

ISSN 0032-4361

